

中國報

EL POPOLA

ĈINIO




● Nova ondo — Esperanton en la sciencoj

● Ĉinio kun 90 milionoj da maljunuloj

● Kamparaj noktoj







## INTER NI

● Dum multaj jaroj oni diras ke Ĉinio estas sovaĝa lando. Ĝi havis nur unu novaĵon: Ĉina Murego. Ankoraŭ nun kiam mi diras ke se mi estus riĉulo mi vizitus unue Ĉinion, poste aliajn landojn. Ili diras al mi: "Ĉinio! La plej malbela kaj plej malriĉa lando de la mondo!"

Tial mi ŝatas vidi kaj legi en "El Popola Ĉinio" la progreson de Ĉinio, de kamparanoj, de profesoroj, de sciencistoj, por ke mi povu montri al miaj familianoj, amikoj, kamaradoj kaj gelnantoj, ke Ĉinio estas tre prospera kaj tre moderna kaj ke Ĉinio havas multajn aferojn, kiujn multaj landoj ankoraŭ ne havas.

**S. MALHEIROS (Brazilo)**

● En multaj landoj homoj interesiĝas pri la t.n. nekonvenca medicino (naturmedicino), al kiu apartenas ankaŭ via rubriko "Por via sano". Daŭrigu tion. Eble paralele vi povus publikigi iujn porvirinajn rubrikojn? Ekz. temas pri ĉinaj brodaĵoj, aŭ pri modeloj de ĉinaj trikaĵoj. Ĝenerale vi faras tre utilan laboron per EPĈ en la sfero de la informado kaj mi plene subtenas vian redaktan linion, cetere mi ĉi-rilate samopinias kun mia edzo.

Mi rimarkis, ke en 1987 vi dediĉis multe da atento al E-temoj kaj speciale al la Jubileo, kio estis tre utila. Ne manku E-temoj ankaŭ estonte. Eble iuj elstaraj e-istoj povus kontribui per unu artikolo al ĉiu numero, kio donus pli da internacieco al via laboro... La jubile-jara agado fakte neniam devus finiĝi.

**H. PETTYN (Pollando)**

## ENHAVO

### 12 Karmemore al Majstro la Deko Bainqen

6 FACETO DE LA ĈINA SOCIO:

#### Kamparaj noktoj

### 24 Ĉinio kun 90 milionoj da maljunuloj

54 VOJAĜO LAŬ YANGZI-RIVERO (29):

Yangzhou kaj Zhenjiang abundaj je fiŝoj kaj rizo

29 LIBERA FORUMO DE EMINENTAJ E-ISTOJ:

#### Nova ondo — Esperanton en la sciencoj!

15 POR KOMENCANTOJ:

Tri fabloj

28 ESP-NOVAĴOJ

52 Kiel mi studis eksterlande?

48 ĈINA LITERATURO:

Xin Qiji, patriota ci-isto de la Suda Song-dinastio  
El ci-oj de Xin Qiji

40 Arta reciproko

21 Hao Yongming kaj liaj pentraĵoj

59 ĈINAJ ARTOJ:

Ĉinaj figuropenetraĵoj (I)

51 ĈINA MEDICINO:

Ĉinmedicina prevento kaj kuracado de oftaj malsanoj (I)

16 Vizito al lando de tu-oj

36 Ĉarma galerio de naturaj artaĵoj

19 Ruinoj antaŭ 3 500 jaroj sude de Yangzi-rivero

34 ALILANDANOJ PRI ĈINIO:

Mia hejmo en Pekino

44 KURANTAJ AFEROJ

4 INTER NI

15 33 KORESPONDI DEZIRAS

SUR LA KOVRILO:

Ĝardeno de Suzhou (Guaŝo)

Farita de **HAO YONGMING**

2 Giganta budho en Leshan

Foto de **CHEN DONGLIN**

La giganta budho sidas en la urbo Leshan de Sichuan-provinco. La budho estas skulptita sur apika rokmuvo de Lingyun-monto apud Minjiang-rivero. La skulptado daŭris 90 jarojn kaj finiĝis en la jaro 803. La 71-metra budho estas la plej granda en la mondo.

26 Novaj konstruaĵoj en Pekino

Fotoj de **RU SUICHU**

46 Savŝipo sur glacia maro

Fotoj de **WANG JINSHENG**

4 La Granda Kanalo

Foto de **YU ZHIXIN**

11 Bela melodio (Ĝenroj de nacimalplimulto)

de **JIN JIEZHONG**


SUR LA DORSKOVRILO:

[ĈINAJ POŝTMARKOJ]

Orkideoj

## LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO

1. Hangzhou
2. Suzhou
3. Changzhou
4. Wuxi-gubernio
5. Wujiang-gubernio
6. Xining
7. Tu-nacieca Aŭtonoma Gubernio Huzhu
8. Jiangxi-provinco
9. Fujian-provinco
10. Guangdong-provinco
11. Taiwan-provinco



# Kamparaj Noktoj

de HUA GUOWEI

Fotoj de XU PENG

**V**ESPERIĜIS. Vigleco regis en la rakontejo de la kultura centro en la parko Zhenzhong de la urbeto Luoshe de Wuxi-gubernio, Jiangsu-provinco. Du artistoj kun intereso rakontis kaj de tempo al tempo ilin rekompencis la aŭskultantoj per ridego kaj admiro. 63-jara Gao Shixing diris al mi: "Ĉiu-vespere mi frekventas la lokon. Post aŭskultado mi promenas en la parko antaŭ ol hejmenreveni. Kaj nun en la kamparo riĉiĝas enhance vesperoj." Li diris ankaŭ, ke nun lia edzino rigardas televidon kun sia nepo kaj lia 30-jara filo ludas gitaron en la kamparana postlabora orkestro.

La vespero estis ordinara por la tieaj kamparanoj, sed ĝi havas neordinaran ŝanĝiĝon. Antaŭ multaj jaroj preskaŭ ĉiuj kamparanoj de tiu loko vivis laŭ malnova maniero: Je la vesperiĝo la kamparanoj fermis la pordojn kaj enlitiĝis. Neniu vidiĝis sur la vojoj inter la vilaĝoj kaj en la stratoj. Ĉie regis kvieto. Kaj nun ili jam adiaŭis la monotonajn vesperojn.

La urbeto Luoshe estas kampara urbeto kun 50 000 loĝantoj. De 1984, la urbeto investis pli ol kvin milionojn da juanoj por konstrui kamparanan kulturalan domon, kinejon, teatron, kulturalan centron en la parko kaj funkciigis dekelkajn kulturajn instalaĵojn, kiaj biblioteko, video-projekciejo kaj glitejo. Ĉiuvespere multaj kamparanoj biciklas al ili por sin amuzi.


De 1978, en la vasta kamparo de Ĉinio oni praktikas la ekonomian reformon, la jara enspezo de la kamparanoj kreskis kelk- aŭ dekelk-oble kompare kun tiu en la pasinteco. Sin liberiginte de materia malriĉeco, ili ne plu volis pasigi solecan kaj monotonan vesperon, sed male, multe klopodis por sin liberigi de la malriĉeco de la kultura vivo.

Laŭ enketo, en la lastaj jaroj en vilaĝoj de la provincoj Zhejiang, Jiangsu, Shandong kaj Hebei,



Balejo en kamparo





Sur rulglitejo



Orkestro por tetrinkejo



Amatoroj de pekin-opero

oni konstruis milojn da kulturaj domoj. Ĉiujare la vendkvanto de televidiloj kreskis je 50% kaj kamparanoj sur 70% de la teritorio de tiuj lokoj povas ĝui radiajn kaj televidajn programerojn.

Nature, tiuj ŝanĝigoj estas kortuŝaj por la ĉinaj kamparanoj, kiuj longtempe havis nenian kulturan amuzon en vespero. Nun, ĝi altiras ilin kiel magneto. Ofte okazas, ke antaŭ vesperiĝo iuj gejunuloj pensas gliti, danci, ludi bilardglobon aŭ rigardi filmon. Antaŭ dek jaroj, ili devis iri dek kilometrojn por

rigardi filmon. Laŭ raporto el Jiangsu-provinco, en la lasta jaro la nombro de film-rigardantoj atingis 2.5 miliardojn, inter kiuj duono estis kamparanoj.

Estas klare, ke la vespera vivo de la kamparanoj disvolviĝas al tiu de urbo en malsamaj gradoj. Tiun tendencon reprezentas la urbeto Pingwang en suda Ĉinio. Ĉiuvespere, lumplena estas la bele ornamita surakva balejo, multaj kamparanoj el ĉirkaŭaj vilaĝoj ĝoje dancas diskon. En la balejo brilas lampoj kaj regas ĝojo kaj vigleco. Ni Chunxian, direktoro de la balejo, diris: "Junaj kamparanoj ofte vojaĝas al grandaj urboj kaj rapide ellernas multajn amuzajn manierojn, tial ili bezonas taŭgan lokon por trinki kafon kaj laŭplaĉe danci

vespere."


27-jara kamparano Gu Cairong, de la vilaĝo Zhenbei de la urbeto, vizitas la balejon, almenaŭ kvarfoje semajne. Li diris: "La ritmo de disko estas forta kaj plaĉas al junuloj." Li estas lerta en kamplaboro kaj komerco kaj ĉiujare enspezas pli ol 20 000 juanojn. Lia hejmo distancas kvin kilometrojn de la balejo. Li ofte vizitas ĝin per motorciklo.

Kompare kun Gu Cairong, multe feliĉaj estas la kamparanoj de la urbeto Lili en Wujiang-gubernio,

Intereso pri legado



Amanto de kaligrafio





Jiangsu-provinco. Post dek-minuta piedirado ili povas atingi balejon. Antaŭ du jaroj la registaro de la urbeto asignis sumon da mono por konstrui la balejon kun areo de 100 kvadrataj metroj, kinejon kun 900 sidlokoj, video-projekciejon kun 400 sidlokoj kaj pluruzan kulturenan stacion, por kontentigi la bezonon de la kamparanoj pri postlabora kultura vivo.

Kompare kun tia kultura vivo simila al tiu de urbo, multe natura kaj simpla estas la nokta pejzaĝo sur la vastega Weishan-lago en la sudokcidenta Shandong-provinco. En la someraj noktoj tie blovas malvarmeta vento, aromas cent miloj da muoj (1 muo egalas al 1/15 hektaro) da lotusfloroj, kun folioj balanciĝantaj en vento. De la akvosurfaco de la lago aŭdiĝas sonoj de remado, kaj saltas fiŝoj kaj brilas lampoj super ĝi. Ĉiuvespere tie kolektiĝas miloj da fiŝboatoj, sur kiuj viroj kaj virinoj ripozas babilante. La maljunuloj rakontas pri legendoj, la plenkreskuloj babilas pri vetero kaj kamplaboro, la junuloj diskutas pri novaj aferoj de la mondo kaj la infanoj kantas kaj ludas petole.

Estis interese, ke inter la fiŝistoj estas multe da urbaj junuloj. Ili venas al la loko speciale por trankviliĝi. Al ili plaĉas la nokta pejzaĝo de Weishan-lago.

La kreskanta amuza afero en la kamparo ne ŝanĝis la simplan sintenon de la kamparanoj al la vivo. Ne ĉiuj vesperoj de la ĉina kamparo estas tiaj. Multe da kamparanoj ankoraŭ ne volas iri longan vojon por partopreni grandajn vesperajn kunvenojn, sed ili sin amuzas en "kulturaj specialigitaj familioj". En tiuj familioj estas televidiloj, videoaparatoj, libroj, ŝakoj, filmo- projekciiloj k.a., kiuj



multe riĉigas la kulturenan vivon de kamparanoj.

Sur la kanalo sude de Yangzi-rivero, la transportaj ŝipgrupoj, ŝarĝitaj per karbo, greno kaj konstruaj materialoj, veturas en la nebula lunlumo. Preskaŭ duono de ilia transporta tasko estas plenumita nokte. La ŝipanoj povas rigardi televidon sur ŝipoj. Se iliaj ŝipoj ankriĝas ĉe la bordo, ili povas ĝui simplan kaj plezurigan kulturenan vivon en ĉiu ajn urbeto.

La bruo de motoroj kaj la ondoj, levitaj de veturantaj ŝipoj, perdigas ĉasaĵojn de kamparanoj, kiuj fiŝas nokte. Tiuj fiŝistoj venas nokte al la riverbordo ne nur por kapti fiŝojn kaj krabojn, sed ankaŭ por ĝui grandan ĝojon akiritan el la antikva kaj simpla fiŝado.

Kompreneble, en ĉarmaj vesperoj junulinoj havas pli da feliĉo por ĝui. 21-jara Shen Yan tre ĝojis pro tio, ke ŝiaj gepatroj permesis al ŝi danci. Iuj junulinoj ne povis endormiĝi tutnokte pro emociiĝo estigita de rigardado de la vilaĝa nokta pejzaĝo kune kun siaj amatoj. ■

## ABONTARIFO DE EPĈ

(ekvalidas la 1-an de oktobro 1988)

lando	valuto	1 jaro	2 jaroj	3 jaroj
Aŭstralio	AUD	15.00	25.00	35.00
Aŭstrio	ATS	200	340	480
Belgio	BEF	550	930	1300
FR Germanio	DEM	30.00	50.00	70.00
Britio	GBP	8.00	13.60	19.00
Finnlando	FIM	64.00	108.00	150.00
Francio	FRF	90.00	150.00	210.00
Hispanio	ESP	1200	2000	2900
Italio	ITL	18000	30600	43000
Japanio	JPY	3000	5400	7500
Jugoslavio	YUD	3000	5400	7500
Nederlando	NLG	34.00	58.00	82.00
Nov-Zelando	NZD	20.00	34.00	48.00
Portugaliao	PTE	1100	1800	2600
Svisio	CHF	25.00	42.00	60.00
Usono	USD	12.00	20.00	28.00
Kanado	CAD	14.00	23.00	33.00

### Por aliaj landoj en Eŭropo:

GBP	8.00	13.60	19.00
USD	10.00	17.00	24.00

### Po raliaj landoj en Azio, Afriko kaj

#### Latin-Ameriko:

GBP	5.00	8.50	12.00
USD	6.50	11.00	16.00

Ĝenerala distribuanto: Esperanta Sekcio de Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHUDIAN), P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio



Kampanarino antaŭ sursceniĝo



Geedzoj en vejĉi-ludo



Bilardoludo

# Bela melodio

de JIN JIEZHONG

En la bildo du tajaj knabinoj kuŝantaj sur baŝoj folioj fajfas belan melodion per folieto en la buŝo.

En Xishuangbanna de Yunnan-provinco vivas 760 000 tajoj. Ĉe akvoj kaj en arbaroj ofte videblas pavoj kaj oni nomas la lokon "lando de pavoj".

Sveltaj tajaj virinoj portas blankan aŭ ruĝetan senkoluman ĉemizon kaj jupon de diversaj koloroj.

京作捷春戊竹如葉鬱气泥芥人韻情髮拂含竹琴作一綠原段詞林芭三月俸尋何民鶯  
築於中月辰音絲勝木濃王芳心舒和移露香動竹枚蓉曲依幾新蕉月御處歌嘯



# Karmemore al Majstro la Deka Bainqen

**P**RO kormalsano post troa laciĝo, Bainqen Erdini Qoigyi Gyaicain (Banĉen Erdini Ĉojĝji Ĝjajcajn), vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso kaj la honora prezidanto de la Ĉina Budhista Asocio, kiu venis al la templo Zhaxi Lhunbo (Ĝaŝjilunbu) en Xigaze (Ŝjigaze) por inaŭguri la nove konstruitan Grandan Stupaon por la relikvoj de la 5-9-aj Bainqen-lamaoj, forpasis en sia aĝo de 51 jaroj 16 minutojn post la 20-a de la 28-a januaro 1989, kvankam lokaj doktoroj kaj eminentaj kardiologoj venintaj de Pekino per speciala aeroplano ĉiamaniere provis savi lin.

Lia forpaso skuis la landon, malĝojigis la popolon. Ĉiuj naciecoj de Ĉinio funebris pro la altrespektata Majstro laŭdante lian grandan vivon.

En la Unua Sesio de la Dua Tutlanda Popola Kongreso en la 22-a de aprilo 1959 Majstro Bainqen solene deklaris, ke Tibeto ĉiam apartenas al Ĉinio.



## GRANDA PATRIOTO

La laika nomo de la Majstro estis Gongbucidan. Li naskiĝis en kamparana familio en Xunhua(-Ŝjunhŭa)-gubernio de Qinghai (Ĉinghaj)-provinco, la 3-an de februaro 1938. En 1941 li estis elektita kiel reenkarigiĝinto de la naŭa Bainqen-lamao. En la 3-a de junio 1949 li estis nomumita de la registaro la Deko Bainqen Erdini.

En la 1-a de oktobro 1949 fondiĝis la nova Ĉinio. Li tuj telegrafis al la gvidantoj de la Centra Popola Registaro por gratuli la fondiĝon de la nova Ĉinio. Li diris en la telegramo, ke “la feliĉo de la popolo estas esperebla kaj la reprospero de la lando estas antaŭvidebla”, kaj montris subtenon kaj estimon al la Kompartio kaj la Popola Registaro. Lia patriotis-

En 1952 Majstro Bainqen komencis gvidi la aferojn de la templo Zhaxi Lhunbo en Xigaze de Tibeto.





Prezidanto de la ŝtato Yang Shangkun prezidis la funebran ceremonion por Majstro Bainqen en la 15-a de februaro 1989.

mo reprezentis la komunan volon de la patriotoj kaj popolanoj de Tibeto.

En aprilo 1951, kiam la delegitoj de la Centra Popola Registaro kaj la Tibeta Registaro intertraktis pri paca liberigo de Tibeto, la Majstro venis al Pekino por subteni kaj sukcesigi la intertraktadon. En la 23-a de majo la Centra Popola Registaro kaj la Tibeta Registaro subskribis "Interkonsenton pri la Metodoj de Paca Liberigo de Tibeto" (nome "17-artikola Interkonsento"). En la sekvanta tago li publikigis deklaron por aprobi la interkonsenton. Post tio li montriĝis sincera en la solvo de la historiaj problemoj interne de Tibeto por la unueco de la lando, la unuigo de la naciecoj kaj tiu interne de la tibeta nacieco. Li ludis gravan rolon en sukcesigo de partopreno de li kaj Dalai-lamao en la Unua Sesio de la Unua Tutlanda Popola Kongreso en 1954 en Pekino kaj subskribo de la rezolucio por starigo de la prepara komisiono por la Tibeta Aŭtonoma Regiono.

Novembron de 1956 li partoprenis en la hinda jubileo por la 2500-a detreveno de la nirvano de Ŝakjamunio. Dum sia rondiro en Hindio li sendevie akcentis la tradician amikecon inter la ĉina kaj hinda popoloj kaj akcentis nepran observon de la "17-artikola Interkonsento". Lia faro pruvis lian patriotismon.

Marton de 1959, kiam la reakcia kliko el superaj personoj de Tibeto levis armitan ribelon perfidante la "17-artikolan Interkonsenton", la Majstro justoplene batalis kontraŭ la ribelantoj, starante ĉe la flanko de la patrio kaj la popolo. La 28-an de marto la Centra Popola Registaro dekretis malorganizi la Tibetan Registaron, anstataŭigi ĝin per la prepara komisiono por la Tibeta Aŭtonoma Regiono kaj nomumis la Majstron aganta prezidanto de la komisiono. En la sekvanta tago li telegrafe montris al la Centra Popola Registaro sian senŝanceligan aprobon kaj tuj veturis de Xigaze al Lhasa, la ĉefurbo de Tibeto, por gvidi la aferojn de la komisiono. De tiam

la komisiono aprobis serion da principoj kaj politikoj pri subpremo de la ribelo kaj pri la demokratia reformado, grave kontribuante al la radikala ŝanĝigo de la tibeta socio kaj la emancipiĝo de la tibetanoj.

En la dek-jara kaoso de la "kultura revolucio", same kiel aliaj ŝtataj gvidantoj, li estis kruele persekutata. Sed li neniam ŝanceliĝis en fido al la Kompartio kaj la patrio. Kiam la Centra Komitato de la Kompartio decidis komplete renversi la maljustan konvikton kontraŭ li, li kviete diris, ke li jam antaŭvidis tion.

En la nova situacio, ke Ĉinio praktikas politikon de reformado kaj pordmalfermo ekde 1979, la Majstro samtakte antaŭenmarŝis kun la epoko. Por defendi la unuecon de la patrio, progresigi la ekonomian kaj kulturen konstruadon de la regionoj de tibetanoj kaj la regionoj de aliaj nacimalplimulto, por solidigi kaj disvolvi la novajn interrilatojn de egaleco, unuigo kaj interhelpo de la naciecoj de la lando, li laboris kun fervoro, patriotismo kaj devokonscio kaj prezentis diversajn kritikojn kaj proponojn al la Centra Komitato de la Partio kaj la Centra Popola Registaro. Li entuziasme subtenis kaj aprobis la diversajn principojn kaj politikojn ellaboritajn de la Centra Komitato de la Partio kaj la Centra Popola Registaro speciale por Tibeto.

En 1987 kaj 1988 pinĉo da splitistoj kaj eksterlanda splita forto komplotis en levo de pluraj tumultoj en Lhasa. La Majstro plurfoje publikigis paroladon por kondamni la fiagon de la splitistoj. Li ĉiam akcentis: "Mia starpunkto defendi la unuecon de la patrio estas neŝancelebla. Mi oponis, oponas kaj oponos la splitadon al la patrio. Mi pretas fari maksimuman sinoferon por defendi la unuecon de la patrio." La Majstro meritas la nomon de granda patrioto.

## FAMA ŜTATISTO

Majstro Bainqen estis fama ŝtatisto. Li tre zorgis



En 1985 Majstro Bainqen eksplikis al la popolo de Xigaze la politikojn pri nacimalplimultoj kaj religioj.

pri la aferoj de la ŝtato. Li komplete dediĉis sin al defendo de socialismaj interrilatoj de la naciecoj de egaleco, unuigo kaj interhelpo, al la amikeco de la ĉina popolo kun fremdaj landoj kaj al defeno de la mondpaco.

Li estis membro de la Konstanta Komitato de la Unua Tutlanda Popola Kongreso (TPK), vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Dua, Kvina, Sesa kaj Sepa TPK, vicprezidanto de la Tutlanda Komitato de la Dua Ĉina Popola Politika Interkonsilia Konferenco (ĈPPIK), vicprezidanto de la Tutlanda Komitato de la Kvina ĈPPIK, membro de la Konstanta Komitato de la Prepara Komisiono por la Tibeta Aŭtonoma Regiono, ĝia unua vicprezidanto kaj poste ĝia aganta prezidanto.

Li estis membro de la Konstituci-revizia Komisiono. Li prezentis multe da gravaj proponoj dum reviziado de la konstitucio. Kiam la Tutlanda Popola Kongreso diskutis pri diversaj leĝoj, li ĉiam serioze kaj praktike prezentis proponojn por plibonigo de la leĝoj.

Li tre zorgis pri la praktikado de "Leĝo de Aŭtonomeco de Nacimalplimultaj Regionoj" en Tibeto kaj donis multe da sinceraj konsiloj; li helpis la Kompartion en ĝia praktikado de la politikoj pri nacimalplimultoj, religioj kaj unueca fronto; li tre atentis kaj akcentis unuigon inter han-nacieco kaj tibet-nacieco kaj tiun inter diversaj nacimalplimultoj de nia lando, li akcentis, ke tibet-nacieco ne povas disiĝi de han-nacieco kaj han-nacieco ne povas disiĝi de tibet-nacieco, kaj li faris senlacadon por defendi kaj plifirmigi la unuigon inter naciecoj; li tre zorgis pri la ekonomia kaj kultura konstruado de Tibeto, kaj laŭ lia propono oni starigis "Fonduson por Disvolvo de Tibeto", kaj li estis ĝia direktoro. Li akcentis konservi kaj disvolvi la bonan tradicion kulturon de tibet-nacieco, kune kun Ngapo Ngawang-gigme, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de TPK, prezentis gravan proponon pligravigi lernadon kaj uzadon de la tibeta lingvo, kaj tio vekis sufiĉan atenton de la gvidantoj de la partia komitato kaj la registaro de Tibeto. En la lastaj dek jaroj li inspektis en multaj lokoj de la

lando, inkluzive ĉiujn regionojn loĝatajn de tibetanoj. Dum sia inspektado en tiuj lokoj li donis multajn sincerajn kritikojn kaj konsilojn, kiuj ludis gravan rolon en plibonigo de laboroj. Lia faro gajnis altan respekton de la kadroj kaj popolanoj.

Majstro Bainqen gvidis delegaciojn de la Ĉina Tutlanda Popola Kongreso en vizito al Nepalo, Aŭstralio, Brazilo, Bolivio kaj Urugvajo. Li ofte akceptis fremdajn gastojn. Dum tiuj aktivadoj li fidele konigis al ili la realan situacion de la lando, la principojn kaj politikojn de la Kompartio, precipe la politikon de la Kompartio pri libereco de religia kredo kaj la sukcesojn de konstruado de Tibeto. Konigante la atingojn li neniam kaŝis mankojn. Lia vigla kaj enhavoriĉa konigado estis laŭdata de la gastoj.

## ELSTARA RELIGIA GVIDANTO

Majstro Bainqen estis elstara gvidanto de la tibeta budhismo de nia lando kaj erudiciulo pri budhismaĵoj. En 1956, kiam li vizitis Hindion, li estis honorita de hinda budhisma instituto per la titolo de honora doktoro pri budhismo. En 1958 li komencis doni lekciojn pri budhismo en la templo Tar en Qinghai-provinco kaj la templo Zhaxi Lhunbo en Tibeto. Krome li multe verkis pri budhismo. Li aktive helpis la Kompartion kaj la registaron praktiki la politikon pri libereco de religia kredo, defendi la leĝajn rajtojn kaj interesojn de la temploj kaj monaĥoj, kaj aliflanke, laŭ la evoluo de la socio, li multe klopodis konformigi la tibetan budhismon paŝo post paŝo al la socia sistemo de Ĉinio. Kiam komenciĝis la demokratia reformado en Tibeto, li la unua proponis meti la templojn sub la konstitucion pro la feŭda privilegio de la temploj. Lia propono estis enskribita en rezolucion de la Prepara Komisiono por la Tibeta Aŭtonoma Regiono, kio ludis tre gravan rolon en la demokratia reformado de la templo. Li ofte diris, ke grava ne estas la nombro de la temploj, sed tio, ke ili povas kontentigi la bezonon de la religiuloj en ilia religia vivo kaj esti loko en la vera senco por propagandi budhismon, forigi malbonaĵojn kaj fari bonaĵojn; grava ne estas la nombro de monaĥoj, sed tio, ke ili devas esti honestaj, observemaj al la reguloj kaj disciplinoj, diligentaj en studo de doktrinoj de la religio, kaj povas daŭrigi kaj disvolvi la spiriton de Ŝakjamunio. Por tio li persone gvidis la provadon de administrado de la templo Zhaxi Lhunbo kaj akiris valoran sperton. Li ofte edukis la disĉiplojn, ke ili estu kaj fidelaj al la religio, kaj patriotaj kaj bonfaraj al la popolo. Por plibonigi la tibetan budhismon, li establis la Ĉinan Altklasan Tibetan Budhisman Instituton kaj laboris kiel ĝia prezidanto starigante bonan ekzemplon por kulturaj patriotajn eminentajn budhismaĵajn intelektulojn. ■

## TRI FABLOJ

### “CILINDRA ĈAPO”

Ĉinoj nomas homon, kiu ŝatas esti flatata, ŝatanto de “cilindra ĉapo”. Foje iu vizitis sian instruiston antaŭ sia forveturo al nova posteno aliloke. La instruisto diris: “Estu singardema, ĉar ne estas facile funkcii kiel aliloka oficisto.” La instruisto respondis: “Mi jam preparis cent cilindrajn ĉapojn por donaci al ĉiu renkontoto por akiri




ilian simpatian.” La instruisto ek-koleris: “Vi devas honeste trakti aliulojn, kaj kial vi donacos cilindran ĉapon?” La instruisto tamen sin senkulpigis: “Kiel raraj estas la honestaj homoj kia vi, kiu ne ŝatas cilindran ĉapon!” La instruisto kontente kapjesis: “Vi pravas.” Adiaŭinte la instruiston, la instruisto diris al aliaj: “Nun el miaj cent cilindraj ĉapoj restas naŭdek naŭ.” ■

### RIGARDO DE VEJĈIO

Mi rigardis vejĉi-ludon ĉe mia amiko. Iu perdis la ludon plurfoje. Mi mokis lin, ke lia ludarto estas malbona. Poste li petis min ludi kun li. Mi subtaksis lin kaj konsentis tuj, sed post momento li jam ekokupis superecon. En la posta duonpartio mi jam trovis min en embaraso, tamen la rivalo fariĝis pli kaj pli lerta. Fine mi perdis la ludon. Mi ruĝiĝis ĝis la oreloj kaj povis diri nenion. Post la okazaĵo mi rigardas vejĉi-ludon ĉiam silente. ■

## KATOJ

Estis homo, kiu tre abomenis la musojn kaj aĉetis bonajn katojn per multe da mono. Li nutris ilin per fiŝo kaj viando kaj dormigis ilin sur felton. La katoj sate manĝis kaj dormis, ne plu kaptis musojn kaj eĉ sin distris kun ili. La mastro koleregis de tio kaj decidis



ne plu bredi katon, opiniante, ke ne estas bona kato en la tuta mondo. ■

### KORESPONDI DEZIRAS

**Tarifo:** unu internacia respondkuponon por kvin vortoj aŭ mallongigoj. **Por fotoj:** unu intern. resp. kup. por spaco de unu linio. **Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato.** Esp-organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

\* Ekde oktobro 1988 nia porlerneja revuo “Moksleivis” ekaperigis rubrikon “Esperanto” en kiu oni publikigas E-lecionojn kaj priesp. artikolojn. Kontribuaĵojn kaj adresojn de dezirantoj korespondi kun litovaj junaj esp-istoj ni atendas al:

Esperanto, “Moksleivis”, Komunaru 8/10, MTP-4, 232600 Vilnius, Litovio, USSR.

\* Ni intencas fari kontakton kun ĉinaj ges-anoj. Adr.: Departementa Komitato de Bacs-Kiskun de Hungara Esp. Asocio, H-6000 Kecskemet Majus 1 ter 1. pk. 79. Hungario.

\* 26-j. oficisto dez. kor. tm., interesiĝas pri ekonomio, komerco, scienco kaj tekniko, muziko, kaj kolektas pm. kaj bk. Adr. Xu Ping, Di Er Qi Che Zhi Zao Chang, 62 Chang, Ji Shu Ke, Shiyang, Hubei, Ĉinio.

\* Jiang Erke, 26-j. instruisto, dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj. Adr.: P. O. Kesto 8814, Shashi, Hubei,

Ĉinio.

\* Wang Shaohai, 25-j. instruisto, dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj. Adr.: P. O. Kesto 8814, Shashi, Hubei, Ĉinio.

\* S-ro Yang Jingyuan, 34-j. ingeniero, dez. kor. tm. pri lingvoj, elektrotekniko kaj aliaj temoj Esperante kaj angle. Adr.: 26, 8 li 4 duan, Nansanjingjie, Heping Qu, Shenyang, Ĉinio.

\* Geesp-istoj de Changzhou-E-Asocio dez. kor. kun eksterlandaj E-organizoj kaj individuoj pri kunlaboro, interŝanĝado de E-eldonaĵoj, vojaĝoj, kaj kolektado de pm., bk. Adr.: s-ro Zhang Changsheng, 43-2 Tie Shi Xiang, Changzhou, Jiangsu, Ĉinio.



Tu-a junulino en brodado

LI YOULOU (tu-o) kaj LI QIANG:

# VIZITO AL LANDO DE TU-OJ

Fotoj de DAN ZENG kaj LI QIANG

**P**OST du-hora veturado nor-  
den de Xining, ĉefurbo de  
Qinghai -provinco, ni atingis Wei-  
yuan, la sidejon de la registaro de  
la Huzhu-a Tu-nacia Aŭtonoma  
Gubernio. En Ĉinio loĝas 150 000  
tu-oj, kies triono vivas en la nomi-  
ta gubernio. Weiyuan estas la poli-  
tika, ekonomia kaj kultura centro  
de la aŭtonoma gubernio. Tie la  
stratoj estas puraj, ambaŭflanke de  
ili viciĝas arboj kaj staras nove  
konstruitaj etaĝdomoj en bona  
ordo. La plej okulfrapa estas la  
Sonoril-tambura Turo, majeste  
staranta en la centro de la urbeto.  
La ligna turo, konstruita en 1624,  
estas tri-etaĝa, 17 m. alta kaj kun  
aparta tu-nacia stilo. Ĝiaj aleroj,  
kolonoj, pordoj kaj fenestroj estas  
aŭ bele pentritaj aŭ fajne gravur-  
itaj. Pro bona zorgado kaj riparado  
la turo estas perfekte konservita.  
Du stratoj kruciĝas ĉi tie, kun la  
turo kiel la centro. Ĉi tie estas kom-  
erca kvartalo de la urbeto. Sur la  
stratoj kaj en la butikoj vidiĝas  
nur malmultaj homoj. Ĉie regas  
bonordo.

Post elurbiĝo ni piediris duon-

horon laŭ pado kaj atingis vilaĝon  
Xiaoshi, kie koncentre loĝas tu-oj.  
La vilaĝo situas ĉe monto kaj riv-  
ereto, kio faris ĝin pli bela. Ĉirkaŭ  
la vilaĝo kaj domoj kreskas pinoj  
kaj poploj. En la vilaĝo troviĝas  
antikva arbo, dika, alta kaj pros-  
pera. Ĝi estas rigardata de la vila-  
ĝanoj kiel dia arbo. Al neniu estas  
permesate fosadi ĉi tie. Estas mul-  
taj tabuoj por tu-oj. La vilaĝanoj  
amasigis ŝtonojn kaj teron apud la  
vilaĝo, kredante, ke ili povas subigi  
diablojn kaj demonojn. La vilaĝa-  
noj prenas la monton malantaŭ la  
vilaĝo dia monto, kaj estas malper-  
mesate enlasi homojn en la monton  
por dehaki arbojn. Ili rigardas fon-  
ton kiel dian fonton, malperme-  
sante lavadon en ĝi.

Kiam ni alvenis al la pordo de  
iu familio, la korthundo bojis al ni  
senĉese, ĝis ĝia mastro eliris el la  
domo. La domon posedas malju-  
naj geedzoj. Ili salutas nin mur-  
murante. Poste ni informiĝis, ke la  
tu-oj estas gastamaj kaj, kiam ven-  
as gastoj, ili diras en la tu-a lingvo:  
"Gastoj venis kaj feliĉon alportis."

Vizitinte ilian loĝejon, ni trov-  
is, ke tie ĉiu familio havas mal-  
grandan korton ĉirkaŭitan de dika  
muro. La muro estas masonita per  
adoboj supre, tero malsupre kaj  
bildoj de pagodoj mozaike faritaj  
el blankaj ŝtonetoj meze. Ĉe la  
kvar anguloj de la muro kuŝas po  
unu blanka rulŝtono, pri kies funk-  
cio ĝis nun ni ne scias. En la mezo  
de la korto kuŝas rondforma trogo.  
Meze de la trogo staras alta stango  
kun sutra flago. La mastro diris al  
ni, ke la sutra flago estas utila por  
forigi diablojn, neniigi katastro-  
fojn kaj beni la familion. Nun es-  
tas familioj, kiuj jam anstataŭigis  
trogon per florbedo, kie oni plantas  
peonion, dalion kaj aliajn florojn,  
kaj en luksa florado tie ŝvebas bon-  
odoro kaj flirtas abeloj kaj papi-  
lioj, kio pli vivigis la loĝejon.

La kvadrata korto de tu-oj kon-  
sistas el pluraj unuetaĝaj dome-  
toj. El ili la ĉefa domo estas tri-  
ĉambra, septita per tabuloj. En la  
meza ĉambro fronte staras ruĝe  
lakita ŝranko kun memoriga tabu-  
leto de la prapatroj kaj oferaĵo  
sur si. La maldekstra ĉambro es-



tas dormejo. Sur la terlito estas hibaĉo kaj tableto. Tie oni ankaŭ akceptas gastojn. La dekstra estas tenejo. Angulaj domoj servas kiel kuirejo, necesejo, stalo k.a. La konstruaĵoj estas fortikaj kun glata tegmento kaj gravuritaj ligna por-do kaj fenestroj.

La domo frontanta kontraŭ la pordego estas mastra domo, kie loĝas aĝuloj de la familio. La gemastroj invitis nin eniri tien kaj regalis nin per teo. Ili sciigis al ni, ke tu-oj regalas gastojn per bonkvalita teo en bela taso, kaj tiaokaze oni nepre ne uzu tason kun breĉeto aŭ fendeto.

Revenis la filino kaj bofilino kun du nepoj de la gemastroj, kaj tiam la hejmo vigliĝis. La du virinoj portis robon kun malgranda kolumo, oblikve malfermita refaldaĵo kaj buntaj manikoj faritaj el diverskoloraj toloj. Pri siaj buntaj manikoj de la robo la junulinoj diris fiere, ke ili faris mozaikojn de la manikoj imite la kolorojn de ĉielarko. La junulinoj portis purpuran 9veŝton sur la robo, ĉe talio longan kaj larĝan multkoloran zonon kun delikate broditaj bildoj ĉe la du ekstretoj kaj al la zono alpendiĝis fajne broditaj saketo, pinglo-kuseneto, kupra sonorilo k.a. Ili portis surkape koloran rondforman brokatan feltan ĉapon, longajn arĝentajn ornamaĵojn surorele, kio pli ĉarmigis la portanton. Ankaŭ la du viglaj knaboj en belaj broditaj vestoj kaj rondforma felta ĉapo senĝene staris tie por ke ni fotu ilin. La kostumoj de tu-oj varias pro malsamaĝaj homoj, precipe krurumoj de virinoj, kiuj larĝas 30 cm. Fraŭlinoj portas ruĝajn krurumojn kaj edzinoj la nigrajn.

La bofratinoj, reveninte hejmen, tuj komencis kudradi, interbabilante. Evidente ili vivis harmonie. Estas nemalfacile imagi, kiel estiĝas belaj vestoj sub tiaj lertaj manoj. La tu-aj knabinoj jam de infaneco eklernas brodadon por posedi plurajn kudrorimedojn. Antaŭ sia edziniĝo ili dediĉas kelke da jaroj por prepari sian doton: belaj vestoj, broditaj kapkusenoj, sake-

Kampanilo en la gubernio



toj k.s., krome ili devas fari ankaŭ broditajn kapkusenojn por siaj bogepatroj kaj botojn por virinoj de sia bogepatra familio. Parolante, ili montris al ni la botojn faritajn de ili mem. Oni povas facile imagi, kiel ĉarmaj ili aspektas, kiam ili vestas sin per tiaj belaj botoj kaj vestoj. De ili ni scias ankaŭ, ke la tu-aj knabinoj en festa tago zorge sin ornamas kaj, kunportante mem broditajn objektojn, kunvenas kaj vizitas amikinojn kaj aprezas alies artaĵojn. Tion ili faras ankaŭ por viziti foiron.

Kompare kun la junulinoj, la du maljunuloj estis vestitaj multe pli simple. Ili surportis robon kun

basko oblikve malfermita kaj malgranda kolumo, malhel-koloran zonon ĉe la talio kaj rondan feltan ĉapon. La maljunuloj diris al mi, ke iliaj kostumoj jam multe pli simpliĝis. Prenu kapveston kiel ekzemplon. En la pasinteco la kapvestoj estis plurformaj, diskaj, duonrondaj, selformaj kaj aliaj. Poste ni vizitis la tu-nacian folkloran eksponejon de la gubernio kaj trovis la supre menciitajn kapvestojn malfacile vidatajn en la nuna vivo.

Antaŭ la disiĝo ĉiuj membroj de la familio akompanis nin ĝis la elirejo de la vilaĝo kaj invitadis nin refoje gastigi ĉe ili, promesante regali nin per tipa tu-a manĝo. ■

(daŭrigo de p. 51)

adon oni povas preni dekoktaĵon preparitan el po 30 g. da freŝa fragmita radiko kaj bambuŝelo.

C. Vomado pro hipofunkcio: La paciento ofte vomas tiam, kiam li iom pli manĝas, ne ĉiam sentas ŝveliĝon kaj doloron de la stomako, ŝatas varmon kaj timas malvarmon. La malsano daŭras kompare longe. Por kuraci la vomadon oni

povas preni granulojn *Xiangshai-wei*, 6 g. ĉiufoje, 2-foje ĉiutage.

Ĉ. Vomado kun mukaĵo: La vomado ofte estas mukaĵo. La paciento vomas ofte, soifas, sed ne kuraĝas trinki akvon, ĉar tio facile kaŭzas vomadon. Li ofte suferas kapturiniĝon kaj sufokon en la brusto. Por kuraci la vomadon oni povas preni granulojn *Xiangshayangwei*, 10 g. ĉiufoje, 3-foje ĉiutage. ■

# Tianjin-a Magnetbenda Kompanio Limigita



La kompanio (Tianjin Magnetic Tape Co., LTD), investita per ĉina kaj eksterlanda kapitalo, produktas altklasajn kolorajn videobendojn kaj aliajn magnetikajn materialojn.

La videobendoj kun marko MTC estas faritaj el altkvalita materialo per avangarda tekniko kaj kompareblaj kun mondfamaj videobendoj de aliaj landoj.

La videobendoj MTC donas klaran bildon, okulplaĉajn kolorojn kaj plej belan sonon.

Adr.: Dongting-strato, Nr. 20, Hexiqu, Tianjin, Ĉinio

Tel.: 285944, 285963

Cable: 9876

Tlx: 23334 TJMAG CN

# Ruinoj antaŭ 3 500 jaroj

## sude de Yangzi-rivero


de ZHANG YIHUA\*

Fotoj el la Muzeo de Jiangxi-provinco



Bronza ding-o kun tigroformaj teniloj kaj plataj piedoj

Bronza lanĉo



**Y**ANGZI-RIVERO kaj la Flava Rivero estas du grandaj riveroj sude kaj norde transverse trafluantaj Ĉinion. Antaŭ ĉ. 3 600 jaroj la nacioj loĝantaj ĉe la meza kaj malsupra basenoj de la Flava Rivero jam fondis Shang-dinastion (1711 a.K. - 1066 a.K.), la orientan civilizacian antikvan landon, plej prosperan en la ĉina sklava socio. Kio okazis en la baseno de Yangzi-rivero en tiu ĉi periodo? Antaŭe oni neniam trovis tipan objekton aŭ ruinon de Shang-dinastio en la suda regiono de Yangzi-rivero, tial la ĉinaj historiistoj opiniis, ke la teritorio de Shang-dinastio ne transiris Yangzi-riveron kaj la suda regiono tiam estis virga lando.

De post 1973, ĉinaj arkeologoj komencis sciancan prifosadon sude de Yangzi-rivero kaj trovis la ruinon de la urbo Wu antaŭ 3 500 jaroj. Tio prezentis valoran materialon por koni la ekonomion, kulturon kaj vivon de tieaj antikvuloj.

La ruino de la urbo Wu troviĝas en la montetara regiono meze de Jiangxi (Ĝjangŝji)-provinco, kun areo de ĉ. 4 kvadrataj kilometroj. Post ses-foja prifosado, arkeologoj trovis ĉ. cent ruinojn kaj grandan kvanton da antikvaj objektoj, kiuj vidigas aspekton de la urbo Wu antaŭ 3 500 jaroj. La antikva seka riverujo montris, ke apud la urbo serpentumis rivereto larĝa ĉ. 60 metrojn. Sur la suda

montodeklivo sidis duonkavernaj pajlaj kabanoj. Iliaj plankoj kaj muroj estis fajre bakitaj. La kabanaj ruinoj montris la ĉambrojn ne-grandaj kaj kvadrataj, kun pordoj fronte al la sudoriento. Ĉirkaŭ ĉiu kabano ekzistis kolonaj kavoj. Tio montras, ke tiam oni jam scipovis subteni la tegmenton per kolonoj. Meze de la ĉambro estis ronda fajrejo por kuirado kaj hejtado. En la vilaĝo estis mallarĝa vojeto el porcelanaj pecoj, ovalaj ŝtonoj, laterito kaj sablo. La kolonaj kavoj en bona ordo simetrie dislokiĝis ambaŭflanke de la vojeto. Laŭ takso, super la vojeto eble konstruiĝis koridoro. Ĝia trovo montris, ke la urbo Wu estis kompare granda ruino de loĝloko, tiu ĉi vojeto konstruiĝis ne por ordinaraj loĝantoj, eble por dio-kulto de sklavoposedantoj kaj por altranguloj.


En la vilaĝo troviĝis neprofundaj rondaj putoj kun aperturo de ĉ. 30-60 centimetroj, sur la fundo estis ovalaj ŝtonoj. Ekster la vilaĝo oni trovis pli ol dek tombojn kun vertikala kavo aŭ pota ĉerko en ronda terkavo. La enterigaĵoj estis ceramikaĵoj, bronzaĵoj kaj armiloj, produktaj instrumentoj, kiaj ceramikaj tranĉiloj, ŝpinaj radoj k.a. Tiuj objektoj montris, ke la tiamaj virinoj jam scipovis la teknikojn de ŝpinado, teksado kaj vesto-farado. La vinujoj montris, ke la tiama agrikultura produktado estis stabila kaj pretigis kondiĉojn por fari vinon. La delikate faritaj bronzaĵoj plejparte estis ritaj instrumentoj kaj armiloj, ili ekzistis samtempe kun simplaj kaj pezaj ŝtonaj hakiloj kaj ŝtonaj tranĉiloj. Tio montris, ke la produkta rimedo restis tre postĝinta,

kvankam la tiamaj homoj jam posedis pli altan teknikon por muldi bronzaĵojn, kaj la sklavo devis sin okupi pri peniga fiziklaboro.


La granda kvanto da elterigitaj ceramikaĵoj montris, ke la ceramiko siatempe jam atingis tre altan nivelon, la diversaj vazoj estis plastike normalaj. Inter ili estis diversspecaj kuiriloj, vazoj kaj produktaj instrumentoj. Sur multaj ceramikaĵoj gravuriĝis belaj desegnoj. Estis valora trovo la pli ol 150 ideografiaj signoj sur 108 elterigitaj ceramikaĵoj, estis malsamaj la nombroj de ideografiaj signoj sur ĉiu vazo, maksimume 12. Tiujn signojn oni nomis ceramikaj hieroglifoj, antaŭe malofte trovitaj. Ili estas valoraj historiaj objektoj kaj havas gravan valoron por esplori la ĉinan historion kaj ĉinan literaturan historion.

Post la prifosado de la ruino de la urbo Wu, oni trovis ruinojn antaŭ 3 500 jaroj sinsekve ankaŭ en la provincoj Jiangsu kaj Zhejiang en la meza kaj malsupra basenoj de Yangzi-rivero kaj en la provincoj Fujian, Guangdong kaj Taiwan. La riĉaj arkeologiaj materialoj montris, ke antaŭ 3 500 jaroj la suda regiono de Yangzi-rivero jam eniris en la sklavan socion kaj aperis kompare prosperaj agrikulturo, metio kaj bronza muldo. La trovo pruvis, ke same kiel la Flava Rivero, ankaŭ Yangzi-rivero estas lulilo de la ĉina nacio. En la pasintaj miloj da jaroj, la ĉina nacio laboris, vivis en la basenoj de la du grandaj riveroj, kreis kaj disvolvis en reciprokaj influo kaj kunfandiĝo la brilan civilizacion de la ĉina nacio. ■


\* La verkinto estas laboranto de la Muzeo de Jiangxi-provinco.



Fajenca vazo kun alta kolo



Fajenca tripieda kuirpoto




Fajenca tranĉilo

Ideogramoj sur fajencaĵo



Fajencaĵoj por ŝpinado



XUE SHENG:

# Hao Yongming kaj liaj pentraĵoj



Hao Yongming en pentrado

**O** KAZE de la 800-jariĝo de la parko Beihai (antaŭe imperiestra ĝardeno) de Pekino, en ĝi estis aranĝita ekspozicio de guaŝoj. Ĉiuj 40 guaŝoj estis faritaj de unu persono. Li kunfandis la ĉinan kaj okcidentan pentrarton kaj bildigis de multaj flankoj la parkon nordokcidente de la Imperiestra Palaco. Liaj pentraĵoj multe interesis ĉinajn kaj alilandajn vizitantojn, kaj ingeniero de la Federa Germanio kvarfoje vizitis lin kun la peto aĉeti ĉiujn liajn ekspoziciitajn guaŝojn por donaci ilin al sia patrio okupiganta pri pentrado.

La pentristo de tiuj guaŝoj nomiĝas Hao Yongming. Li ĝuas renomon en la rondoj de pentristoj kaj arkitektoj per sindediĉo al pentrado ekskluzive pri antikvaj konstruaĵoj. Hao aĝas 56 jarojn. En la kvindekaj jaroj li okupiĝis pri sceneja dekorado en drama trupo. En la sesdekaj jaroj li komencis pentradon. Li laboris kelke da tempo sur Wumen-pordego de la Imperiestra Palaco. Ĉiutage li povis vidi de alte maron da imponaj haloj. Li sentis, ke la strukturo, la koloroj kaj la plastiko de la palaco estas senkompare belaj en la mon-

do. Li absorbiĝis en la pompeco de la palaco kaj ekhavis fortan deziron bildigi ĝin.

Unue, li provis pentri akvarelon. Sed haloj pentritaj en tiu formo perdis la imponecon, dum olepentrado ne povis delikate prezenti la fajnajn ĉarpentaĵojn de la konstruaĵoj. Post longa provado li trovis, ke guaŝo estas la plej taŭga formo. Li guaŝis sur nigra papero, kaj la nigraj partoj sen farboj konturis la konstruaĵojn. Liaj pentraĵoj karakteriziĝas per lumeco kaj ombro videblaj en la okcidenta pentrado kaj ankaŭ per la riĉeco de la tradicia ĉina pentrado.


Hao Yongming ne estas geniulo, sed li estas malkaŝema kaj honesta. Kiam li decidis dediĉi sian tutan energion al pejzaĝa guaŝado de antikvaj konstruaĵoj, li komplete flanken metis la sekuralajn antaŭjuĝojn. En Ĉinio estis artformo de liniila pentraĵo (la pentranto strekas per liniilo) ĉefe pri palacaj konstruaĵoj majestaj kaj ornamriĉaj. Sed samtempe kun tio, ekzistis literaturista pentraĵo multe pli akcentita ol liniila pentraĵo. Artistoj de liniila pentraĵo

ofte estis rigardataj kiel farbistoj. La kutimo daŭris longan tempon, kio malhelpis evoluon de la liniila pentrado. Hao Yongming heredis tiun antikvan pentrarton.


Li diligente pentradis dum multe da jaroj. Por tagmango li ofte havis nur botelon da akvo kaj du panojn. De sunleviĝo ĝis sunsubiro li pentradis antikvajn konstruaĵojn, kiaj la Imperiestra Palaco, la parko Beihai, la Ĉiela Altaro, la parko Jingshan, la domo de princo Yixin... En la lastaj jaroj li interesiĝis pri la elegantaj antikvaj ĝardenoj en la suda urbo Suzhou. Foje li loĝis tie 3 monatojn kaj faris multajn pentraĵojn.

En la lastaj dudek jaroj Hao Yongming faris ĉirkaŭ 600 skizojn kaj aranĝis 11-foje ekspozicion de siaj pentraĵoj. Liaj pentraĵoj estas multe ŝatataj ne nur pro la serioza pripensado por la strukturo, delikataj linioj, densaj koloroj kaj riĉaj nuancoj, sed ankaŭ pro tio, ke la aprecantoj perceptas en liaj verkoj lian amon al la orienta civilizacio kaj lian fidon al la patrio. ■

Gardeno en la Imperies-  
tra Palaco



Beihai-parko





La ġardeno Ouyuan en Suzhou



La ġardeno Shizilin en Suzhou

CHEN BAOHE:



Piktura leciono en la Maljunula Instituto de Haidian-distrikto de Pekino

# Ĉinio kun 90 milionoj da maljunuloj

**E**N la efektivigado de la nacia ekonomia modernigo Ĉinio devas solvi ankaŭ la problemon kaŭzitan de 90 milionoj da maljunuloj.

La statistiko farita en la lasta jaro montras, ke sur la ĉina kontinento la nombro de la maljunuloj super la aĝo de 60 jaroj jam atingis 90 milionojn, kiuj konsistigas 8.4% de la totala loĝantaro de la lando. En la fino de la kuranta jc. la nombro de la ĉinaj maljunuloj kalkuliĝos al 130 milionoj, kiuj konsistigos pli ol 10% de la totala loĝantaro de la lando. Kaj tiu procento estas la normo konfirmita de la internacia socio por la lando, kiu alfrontas la problemon de multiĝo de maljunuloj en la nuna tempo.

La problemo de multiĝo de maljunuloj aperis unue en la grandaj urboj kaj sudorienta marborda regiono de Ĉinio, kie la ekonomio plej prosperas. En Ŝanhajo vivas pli ol 11 milionoj da loĝantoj, inter kiuj 1.65 milionoj da homoj havas la aĝon super 60 jaroj kaj konsistigas 13.4% de la totala loĝantaro de

la urbo. Jam en 1987 la procento de maljunuloj en Pekino atingis 10%, kaj tiu en la fama ĉina turisma urbo Hangzhou estis 10.89%. Evidentiĝas, ke tiuj urboj fariĝis urboj de maljunuloj.

La rapida altiĝo de la procento de maljunuloj en Ĉinio estas kaŭzita ĉefe de:

Unue, la politiko de naskolimiĝo en Ĉinio estas kompare bone efektivigita, tial la pliiĝo de loĝantoj estas malgrandigita kaj rimarkinde malkreskas la procento de infanoj en la totala loĝantaro. Laŭ statistiko, ekde la praktikado de la politiko de naskolimiĝo la naskokvanto en Ĉinio reduktiĝis je 100 milionoj, tiel ke la procento de maljunuloj altiĝis relative.

Due, longiĝas la meznombra vivdaŭro de ĉinoj. En la 40-aj jaroj la meznombra vivdaŭro de ĉinoj estis nur 35 jaroj. La ĝenerala esploro de loĝantoj farita en 1982 montras, ke la meznombra vivdaŭro de ĉinoj estas 69 jaroj.

En la 80-aj jaroj la problemo

pri multiĝo de maljunuloj vekis atenton de la ĉina registaro kaj iuj fakuloj. En 1982 Ĉinio sendis sian delegacion partopreni en la Monda Kongreso pri la Problemo pri Multiĝo de Maljunuloj okazigita tiujare. En la sekva jaro Ĉinio funkciigis la Ĉinan Komitaton de la Monda Kongreso pri la Problemo pri Multiĝo de Maljunuloj. Poste, en Ĉinio 27 provincoj, aŭtonomaj regionoj kaj municipoj rekte sub la centra registaro organizis la Komitatojn pri la Problemo pri Multiĝo de Maljunuloj. Instancoj kaj entreprenoj de diversaj lokoj starigis maljunulajn asociojn kaj similajn organizojn, kiuj respondecas pri aktivado de maljunuloj kaj solvado de iliaj problemoj. Nun en diversaj lokoj de Ĉinio estas 60 000 terenoj speciale por maljunuloj. Por ili ankaŭ ekspluatigas 30 specoj da ĵurnaloj kaj gazetoj kaj funkcias 80 hospitaloj kaj 3 000 kuracejoj.

La ĉina registaro komencis zorgi pri la senhelpaj maljunuloj en la 50-aj jaroj. Pri la laboro responde-



cis la departementoj de civilaj aferoj sub diversnivelaĵoj registaroj. Ekde tiam en diversaj lokoj fondiĝis maljunulejoj per mono asignita de la registaro. La maljunulejoj akceptas nur senhelpajn gemaljunulojn. Nun en Ĉinio troviĝas 370 000 maljunulejoj sub la departementoj de civilaj aferoj, kun 440 000 maljunuloj. En la lastaj jaroj, kun la disvolvigo de la urba kaj kampara ekonomio ankaŭ iuj bonefikaj entreprenoj kaj riĉiĝintaj personoj starigis per sia propra mono organizojn favore al ĉelokaj maljunuloj.

Por kontentigi la kreskantan bezonon de la emeritaj maljunuloj pri kulturo, ekfunkciis universitatoj por maljunuloj sub la subteno de maljunulaj asocioj kaj registaraj departementoj de diversaj lokoj. "La Maljunula Universitato sub la Ruĝa Kruco de Shandong-provinco", funkciigata en 1983 en Jinan (Ĝjnan) de la provinco, estas la unua el tiaj universitatoj. Post ĝia fondiĝo en Ĉinio aperis 543 tiaj lernejoj kun pli ol 100 000 partoprenantoj, inter kiuj 50 000 diplomitiĝis.

Laŭ la trajtoj kaj bezono de maljunuloj, en tiaj universitatoj oni instalas jenajn lernobjektojn: sanprotekto, maljunula sporto, psikologio pri maljunuloj, edukado pri infanoj, literatura verkado, historio kaj geografio, kaligrafio, pentrarto, ĝardenistiko, gastronomio, kudrarto, fotografio k.a. Donas lecionon en ĝi fakuloj de diversaj rondoj en la socio aŭ emeritaj maljunaj fakuloj. La universitato havas lokon en stacio por maljunuloj aŭ en klasĉambro de proksima lernejo. S-ino Huang Shen antaŭe estis ŝtatoficistino de la Ministerio de Publika Sano, kaj nun ŝi lernas la ĉinan pentrarton en maljunula universitato de la orienta distrikto de Pekino. Ŝi diris, ke ŝi lernas por riĉigi sian spiritan vivon.

La ĝenerala esploro de loĝantoj montras, ke Ĉinio havas pli ol 33 milionojn da maljunuloj, kiuj perdis siajn edz(in)ojn, interalie, la procento de virinoj, kiuj perdis siajn edzojn, atintis

58.1%. Maljunuloj perdas siajn edz(in)ojn, kio estas peza bato por ili, pliigas al ili la solecon kaj damaĝas la sanon. Por helpi la maljunulojn, kiuj deziras denove organizi familion, la maljunulaj asocioj de diversaj lokoj prenas sur sin la taskon esti svatistoj por ili. En iuj lokoj funkcias svat-agentoj por maljunuloj. Pekino komencis la laboron kompare frue. En la tuta urbo troviĝas 43 svat-agentoj, kiuj geedzigis proksimume 300 parojn da gemaljunuloj. Ŝanhajo atingis pli grandan sukceson tiurilate. Nur en 1987 la maljunulaj organizoj de la urbo helpis al 2 500 paroj da gemaljunuloj organizi novan familion.

Krome, la registaroj kaj maljunulaj organizoj de diversaj lokoj ankaŭ konstruis domon kun apartamentoj por maljunuloj. Tia domo estas konstruita per la mono asignita de la registaro aŭ kolektita de la socio. Ĝin mastrumas specialaj personoj. Kompreneble, la maljunuloj, kiuj loĝas en ĝi, devas pagi por la servo.

En majo de 1987, la urbo Hangzhou ekfunkciigis la unuan domon por maljunuloj. Nun en ĝi loĝas pli ol 50 maljunuloj. Ĝi estas bela trietaĝa domo kun proks. 60

litoj. La 93-jara Wang Ruqiang (Ŭang Ĵuĉjang) estas la plej aĝa el la maljunuloj loĝantaj en ĝi. Li opinias, ke la loko estas bona, mediodiokveta kaj medicina servo ideala. Li havas unu filon kaj unu filinon, sed la loĝejo de la familio estas malvasta. Kaj kiam la gefiloj estas en laboro, pri li zorgas neniu, tial li transloĝiĝis en la domon, kiu postulas pagon laŭ la servobezono de maljunulo. Ĝenerale, la pago estas 85-120 juanoj. La plejparto de la maljunuloj tie loĝantaj estas emeritaj ŝtatoficistoj, profesoroj kaj aliaj salajruloj.

En Ŝanhajo, Pekino, Shenyang, Harbin kaj aliaj urboj de Ĉinio troviĝas domoj por maljunuloj. Tamen, tio ankoraŭ ne povas kontentigi la bezonon. Ni prenu la urbon Hangzhou kiel ekzemplon: La unua domo por maljunuloj havas nur ĉ. 50 litojn, sed pli ol 400 maljunuloj petis loĝi en ĝi. Tial, kvankam tia loĝejo estas tre bonvena al senhelpaj maljunuloj kaj tiuj maljunuloj, kiuj volas loĝi disde siaj familianoj, tamen en la proksima estonteco ilia bezono ne povos esti kontentigita. El tio videblas, ke la problemo pri multiĝo de maljunuloj en Ĉinio ne devas ignoriĝi, nek estas facile solvebla. ■

En maljunulejo de Shunyi-gubernio, Pekino





Ĉina Televido. La domo altas 130.5 metrojn, senegaia en Pekino. Ĝia totala areo estas 80 000 kvadrataj metroj kaj en ĝi funkcias 19 studioj.

# Novaj konstruaĵoj en Pekino

Fotoj de RU SUICHU

En la lastaj jaroj aperis en Pekino multaj novaj domoj, kiuj plibeligis la urbon. Ĉi tie estas kelkaj ekzemploj.



Pekina Biblioteko. Ĝi estas konstruaĵo en stiloj moderna kaj nacia, kun areo de 140 000 kvadrataj metroj kaj 3 000 sidlokoj kaj 20 milionoj da libroj.



Grandvida Ĝardeno. Ĝi estas projektita laŭ la priskribado en la ĉina klasika romano "Sonĝo de Ruĝa Buduaro". En la ĝardeno estas multaj kioskoj, pavilionoj, turoj, palatitoj, kortoj, koridoroj, pontoj, ardoj kaj aliaj konstruaĵoj.

Metroa stacio Dongsishitiao. La stacio okupas 26 000 kvadratajn metrojn. Surtere estas aŭtovoja trafikkruciĝo.



Hotelo Granda Muro. Ĝi estas 22-etaĝa domo kun vitraj muroj. Ĝi havas areon de 83 000 kvadrataj metroj. Ĝi kun 1 007 apartamentoj estas la plej luksa en Pekino.



## ESP-NOVAĴOJ

● La Internacia Biografia Centro de Usono invitis profesoron Io Chou, faman ĉinan entomologon kaj esperantiston, al la prezidenta kongreso, kiu okazos de la 9-a ĝis la 16-a julio, 1989, en Vaŝington por celebri la 200-jaran jubileon de la prezidenta reĝimo aplikata en Usono. Dum la kongreso, oni organizos la 16-an Internacian Kongreson pri Artoj kaj Komunikoj. Dank' al siaj elstaraj kontribuoj en entomologio kaj Esperanto, profesoro Io Chou estas rigardata kiel internacia famulo de la centro. Li kun plezuro akceptis la inviton.

● 5 ĉinaj esperantistoj sin anoncis por partopreni en la II-a Internacia E-Koresponda Go-Turniro organizita de la Esperantista Go-Ligo Internacia. Ĉar la konkurso estos farata en korespondo, ĝi daŭros 3 jarojn. Ĝin partoprenos 18 vejĉiistoj (goistoj) el 10 landoj.

● Por propagandi Esperanton al la socio, la Liaoyang-a E-Asocio de Liaoning-provinco eldonis lastatempe Esperantan poŝtkarton kun temo — Per Esperanto por mondpaco. Sur la karto du versimilaj kolomboj ĉirkaŭas la verdan stelon kaj la flirtaj floroj en la formo de "E" evidentigis la ĉefan ideon. La aŭtoroj estas Lin Yiming kaj Li Rongfu.

● Sub la aŭspicioj de la Heilongjiang-a E-Asocio, la E-Asocio de Heihe-subprovinco

fondiĝis antaŭ nelonge. Heihe troviĝas ĉe la landlimo inter Ĉinio kaj Sovetunio, pro tio oni esperas, ke la asocio ludos ian rolon por akceli la interŝanĝon en ekonomio, kulturo, sciencoj kaj tekniko inter ĉinaj kaj sovetaĵ esperantistoj.

● La 15-an januare, la Nacidefenda Universitato de Teknologio en Hunan-provinco fondis sian E-Asocion. Ĝi estas la unua E-asocio en altaj lernejoj de Hunan. Pli ol 100 esperantistoj ĉeestis la fondkunvenon.

● La E-Asocio de Interna Mongolio emisiis en la 5-a de januaro la unuatagan koverton kun la speciala poŝtmarko por la Serpenta Jaro (komence de la 6-a februare de 1989) kaj faris memoran stampilon. La unuataga koverto estas presita per la lingvoj han-a kaj Esperanta, kaj sur la stampilo estas vortoj han-aj, mongolaj kaj Esperantaj. En la sama tago, la Changshu-a Poŝtoŝeĉejo en Jiangsu-provinco emisiis similan unuatagan koverton kaj faris similan stampilon. Ili estas projektitaj de veterana esperantisto Zhang Linrui.

● Regule aperas en Venezuelo la gazeto "SEN LIMOJ", kiu estas la oficiala organo de Venezuelo Esperanto-Unuiĝo (VEU). Dank' al tiu gazeto oni povas havi informon pri la Esperanto-vivo en Venezuelo kaj konon pri diversaj aspektoj (historio, geografio, turismo, ktp.) de tiu latinamerika lando. Ricevu tiun gazeton dum la tuta jaro kontraŭ 8 internaciaj res-

pondkuponoj.


● La Kultura Centro de Montpellier, Francio, okazigos, de la 16-a ĝis la 23-a de septembro 1989, la 12-an Internacian Semajnon de Esperanto, en kiu oni povos lerni aŭ perfektigi sian scipovon pri Esperanto, kaj samtempe trapasos agrablajn feriojn en marborda ripoza loko, kadre de agrabla familia domo, proksime de Montpellier, Sudfrancio.

● Andaluzia Esperanto-Unuiĝo organizos la 7-an Andaluzian Kongreson de Esperanto la 12-an — 15-an de oktobro, 1989 en Torrox (Malago) de Hispanio. Eksterlandanoj aliĝas senpage.

● La brazila armeo eldonis turismajn prospektojn en Esperanto rilate al ĝiaj historio, konstruaĵoj k.a. en la ĉefa kazerno. Haveblaj estas ekzempleroj ĉe la Centro de Comunicação Social do Exército, Bloco "B" - Têrreo - Qgex - Smu, BR 70630 - Brasilia, Brazilo.

● De la 15-a ĝis la 21-a de julio 1989 en la universitato "Kiril kaj Metodij" en Veliko Târnovo, Bulgario, okazos la Sepa Sesio de Internacia Somera Esperanto-Universitato (ISEU 1989). Prelegos eminentaj bulgaraj kaj aliandaj sciencistoj kaj specialistoj-esperantistoj kun la celo plialtigi la ĝeneralan kulturon kaj lingvan nivelon de la partoprenantoj. Aliĝantoj sendos sian aliĝilon antaŭ la 30-a de junio, 1989 kaj petu informojn de Esperantista Societo "LUMO", P.K. 121, 5000 Veliko Târnovo, Bulgario. ■

Poŝtkarto eldonita de la Liaoyang-a Esperanto-Asocio de Ĉinio



Internacia renkontiĝo de esperantistoj-invalidoj en Hodonin apud Kunstat, Ĉeĥoslovakio, de la 1-a ĝis la 7-a de novembro 1988



# Nova ondo — Esperanton en la scienccon!

HASZPRA OTTÓ\*

*Ĉi tiu artikolo estas iom kompletigita teksto de prelego prezentita de la aŭtoro en la Scienca Konferenco "Esperanto 100-jara" aranĝita en Vieno oktobre en 1987.*

## LA SCIENCA KAJ TEKNIKA APLIKADO DE ESPERANTO ĜENERALE

La aplikado de Esperanto por sciencaj kaj fakaj celoj startis — simile al la naciaj lingvoj — kun malfruo kompare kun la beletro. Tamen jam en 1904 la eldonejo Hachette en Parizo startigis la aperigon de la unua esperantlingva scienca periodaĵo, en 1905 aperis la unua fakvortaro kaj krestomatiko (pri matematiko), en 1908 fondiĝis la unua internacia scienca asocio, en 1909 la unua internacia faka (fervoĵista) asocio. En 1910...12 aperis en tri volumoj la unua iom granda scienca verko pri la neeŭklida geometrio de Bolyai (Vörös, 1910, 1911, 1912).

Poste venis kvardek jaroj, el kiu periodo de du mondmilitoj, naziismo, stalinismo (en Ĉinio eĉ pli malfrue la t.n. "kultura revolucio") kaj ties sekvoj kvankam ni havas kelkajn, eĉ elstarajn sciencajn kaj teknikajn manifestadojn (libroj de Aisberg kaj Neergaard verkitaj Esperante fariĝis monde konataj en multaj nacilingvaj tradukoj), tamen en la kvindekaj jaroj la scienca aplikado same devis starti preskaŭ de nulo kiel la tuta Esperantomovado mem. Tuj post la dua mondmilito la nombro de la esperantistoj certe ne superpaŝis kelkdek mil, tiu de la agemaj nur



Doktoro Haszpra Otto

kelkcent en la tuta mondo. Kiom da sciencistoj povis esti inter ili? Eble kelkdek aŭ cent, kaj manpleno da agemaj.

Dum la lastaj tridek jaroj la nombro de la esperantistoj eble dudekobligis kaj atingis verŝajne unu milionon almenaŭ kun baznivela parol- kaj skribkapablo. La nombro de la sciencistoj sciantaj kaj volantaj utiligi Esperanton kalkuleblas je kelkmil, inter ili kelkcent estas agemaj. Sed tiu evoluo ĉefe okazis dum la lastaj dek jaroj, kiel videblas el la sekva menciaro de la plej gravaj eventoj.

Fine de la 40-aj, komence de la 50-aj jaroj aperas la Scienca Revuo kaj malgrandaj fakvortaroj (pri ŝoseoj, pontoj, fervojo, meteologio). UEA regule aranĝas ekde 1948 sian Internacian Someran (ekde

1981: Kongresan) Universitaton. En la 60-aj jaroj en Belgio kaj Hungario, poste ankaŭ aliloke startas someraj Esperanto-universitatoj, oni fondas plurajn sciencajn kaj popularsciencajn periodaĵojn (kemia, medicina, geologia, astronomia, ĝenerala, ke nur la natursciencaj estu menciitaj). Ekde 1972 oni regule aranĝas sciencajn prelegojn kaj diskutojn en kelkaj kluboj. En 1976 aperas la volumo "Problemoj de la interlingvistiko" (ruslingve) eldonita de la Scienca Akademio de Sovetio. La organo de la Mondfederacio de Sciencaj Laboristoj ekde 1976 — krom la angla, rusa, germana kaj franca — aperas ankaŭ en Esperanto.

Estas la jaro 1977, de kiam aperas kaj plimultiĝas ankaŭ en

neesperantistaj fakjurnaloj kaj sciencaj periodaĵoj artikoloj pri la lingva problemo de la scienco kun montrado de Esperanto kiel solvo. Eble Kent Jones kaj Dale (1977, 1978) malfermas la vicon en usonaj fakrevuoj, poste sekvas aliaj. Sherwood (1979), Maul (1983), Neergaard (1986) angle, Haszpra (1977, 1979) hungare kaj angle, Peevski (1977) france kaj angle, Vetter (1978) nederlandlingve, Kolker (1982) ruse, Novobilsky (1979) ĉeĥe, Miniero (1980) portugale, Wagner (1987) kaj Frank germane, Gether kaj Haszpra (1988) hungare verkis por Esperanto, ke ni listigu nur natursciencistojn kaj teknikistojn.

En 1978 la internacia interlingvistika simpozio aranĝita en Ahrenshoop, GDR, kie partoprenis ne nur lingvistoj, sed ankaŭ natursciencaj kaj teknikaj fakuloj kaj sociologoj, konstatas, ke "Esperanto estas plej taŭga kiel interlingvo ankaŭ por la sciencoj", kaj ĝi donas gvidprincipojn pri la evoluigo kaj disvastigo de la scienca aplikado de la lingvo (Konkludoj 1978). En Žilina, ĈS, samjare oni aranĝas la unuan internacian sciencon kaj teknikan seminarion, kiun de tiam regule sekvas similtemaj konferencoj en Ĉeĥoslovakio, kaj la tie prezentitajn prelegojn oni publikigas. Jam de 1977 regule ripetiĝas la internaciaj medicinaj konferencoj Esperantaj, alterne en diversaj landoj.

Eĉ la neesperantistaj vortareldonistoj komencas interesiĝi pri la Esperantaj sciencaj vortaroj (Muniksmaa 1973, Csatkai 1976...87, ON 1980, Stoberski 1979, Katsumori k.a. 1987 kaj aliaj). Kaj en 1979 okazas en Marilia, Brazilo, la unua tia internacia scienca konferenco, kiun komune aranĝas esperantistaj kaj neesperantistaj sciencistoj, kaj kie — apud la portugala — Esperanto estas la pli grava laborlingvo. De 1980 la neesperantistaj naciaj kaj internaciaj sciencaj organizaĵoj pli kaj pli ofte aranĝas konferencojn kie ankaŭ Esperanto estas laborlingvo. En la kongreso de la Association Internationale de

Cybernetique (AIC) oni enkondukis — apud la angla kaj la franca — ankaŭ Esperanton, kaj la Esperantlingvan materialon, kiu estis 20 procentoj de la tuto, oni aperigis en aparta volumo (Frank k.a. 1981). Esperanto estas laborlingvo ankaŭ ĉe la kibernetikaj konferencoj en Paderborn, FRG.

De 1981 unu el la laboraj kaj publikigaj lingvoj de la internaciaj ekologiaj konferencoj estas Esperanto en Svištov, BG. La saman jaron estis aranĝata en Tallin, SU, internacia pejzaĝprotektita konferenco, en kies materialo aperis kvinlingva pejzaĝprotektita vortareto enhavanta ankaŭ Esperanton (Optimization 1981). En 1982 grande sukcesis la komputadscienca konferenco INTERKOMPUTO '82 de la hungara Komputosciencista Societo Johano Neumann, en kiu estis prezentataj kaj sesvolume publikigataj pli ol cent studoj, ekskluzive en Esperanto, por la 250 partoprenantoj. En 1985 la jam menciita kibernetika asocio AIC kaj la societo Neumann komune aranĝis konferencojn (INTERKIBERNETIK '85), kie Esperanto estis unu el la laborlingvoj.

Parte de la neesperantistaj sciencaj organizaĵoj la rekono de Esperanto plu kreskas. En 1954 UNESKO akceptis UEA kiel unu el siaj neregistaraj membroorganizaĵoj kaj en 1985 ĝi denove faris rekonan decidon pri Esperanto (Celebration 1985). En la UK en Reykjavik, mem la tiama ĝenerala direktoro de UNESKO, s-ro M'Bow partoprenis kaj faris prelegon. La subtena organizaĵo de la Kuba Esperanto-Asocio, ekzistanta de 1979, estas la Kuba Scienca Akademio. En 1986 la Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj organizis kun pli ol 300 partoprenantoj sian unuan internacian sciencon konferencojn, kies sekcioj kovris ĉiujn ĉefajn scienco-branĉojn. (La dua konferenco en 1988 jam altiris 1400 partoprenantojn.) La asocio ekde 1985 aperigas ankaŭ la dulingvan popularsciencon periodaĵon Tutmondaj Sciencoj kaj

Teknikoj. Cetere en Ĉinio kaj en pluraj landoj de la Tria Mondo oni metas la plej fortan emfazon sur la rolon de Esperanto en la sfero de la interŝanĝo de sciencaj kaj teknikaj konoj (Ouyang 1986). En Ĉinio jam aperis la unuaj Esperantlingvaj sciencaj libretoj (Io, 1986) kaj vortaroj (Zheng 1986 Li 1987) kaj ni scias pri la preparo de aliaj. Sciencon tendencojn montras ankaŭ la nova Korea periodaĵo Mondo de Universitato eldonata de la Dankook-Universitato, Seulo.

Enkadre de la Esperantomovado la plej alta scienca forumo estas jam de jârdekoj la Akademio de Esperanto, kiu tamen okupiĝas nur pri lingvaj demandoj. Post provoj iniciatitaj antaŭ ĉ. dek jaroj, en 1983 kaj en 1986, resp., fondiĝis du aliaj sciencaj akademioj. La Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino (Frank-Böhringer 1985), kiun fakte iom pli karakterizas la instruado kun postdiploma karaktero kaj ankoraŭ malpli la scienca esperado, aranĝas ĉiujare prelegseriojn kaj — laŭ la italaj leĝoj — ekzamenojn, en kiuj lastaj, post la sukcesa defendo de siaj disertaĵoj, la kandidatoj ricevas diversajn sciencajn gradojn. Ĝia ĉefa, sed ne ekskluziva laborlingvo estas Esperanto, kies scio estas unu el la kondiĉoj por membreco kaj diplomricevo. Nuntempe ĝi jam havas pli ol 600 aktivajn kaj simbolajn kunlaborantojn kaj planas aranĝi unu el siaj sekvaj kunsidoj en Pekino. La alia nova akademio (Internacia Scienca Akademio Comenius) iĝis fondita de 21 membroj de naciaj akademioj kaj 7 invititaj elstaraj fakuloj, kun rezidejo en Uppsala, S. La oficiala kaj laborlingvo de la Akademio Comenius estas ekskluzive Esperanto, kaj ĝia celo estas kultivado de ĉiuj sciencoj en Esperanto. Pri la estonteco de la tri akademioj estas ankoraŭ frue fari prognozon, sed ilia nura ekzisto montras, ke kvante kaj kvalite la scienca laboro de la fakuloj aplikantaj Esperanton en la mondo jam maturiĝis por krei tiajn instituciojn.

## ESPERANTO EN LA OPAJ SCIENCOJ. EKZEMPLOJ

Pro la diasporo de la Esperanta "socio" kaj ĝia relative malgranda membro-nombro, formiĝis nur en kelkaj scienco-branĉoj aktivaj grupoj tiom grandaj, kiuj eĉ kvante povas fari signifan fakan laboron. Sendube al tiaj apartenas la fakuloj pri kibernetiko-komputiko-informadiko, kiuj dum la lasta jardeko aranĝis multajn internaciajn kunvenojn, konferencojn menciitajn — signifgrade kunlabore kun neesperantistaj fakaj organizaĵoj aŭ en ties kadro —, havas memstaran internacian organizaĵon (TAKIS), plej grave kontribuas al la fakrevuo Fokuso, kaj unuj el ili nuntempe prilaboras en Nederlando en la sistemdisvolvanta entrepreno BSO unu el la plej promesplenaj duonaŭtomataj traduksistemoj DLT, kiu aplikas Esperanton kiel pontlingvon inter kiuj ajn du lingvoj, utiligante la avantaĝojn ofertitajn de la altgrada reguleco kaj senambigueco de Esperanto (Witkam 1983, 1986). La enmaŝinigo de Esperanto kompreneble ne faros ĝian lernadon superflua, ja la personaj kontaktoj ĉiam estos la plej efikaj per la buŝa uzo de Esperanto.

Simile memstaran agadon kapablas fari la medicinistoj, la fervojistoj, la geologoj, la matematikistoj kaj la kultivantoj de kelkaj aliaj fakoj kaj sciencoj. La aliaj ne atingis la staton aranĝi memstarajn konferencojn, fondi memstarajn revuojn, ili utiligas la aranĝojn kaj revuojn de karaktero ĝeneralscienca. Al ili apartenas la fakuloj pri akvaj aferoj, kvankam la objekto de ilia fako estas unu el la lando- kaj lingvo-limojn malpleje estimantaj praelementoj. Por prezenti ekzemplon, mi iom detaliĝas la atingojn de tiu fako.

Sur popularscienca nivelo la Esperantlingva akvofera literaturo ne apartenas al la plej malriĉaj. Jam antaŭ jardekoj la tiama Nuntempa Bulgario multfoje raportis pri la konstruado de akvorilataj projektoj, akvonodoj, okazinta

en sia lando, dum nuntempe precipe El Popola Ĉinio publikigas regule tiaspecajn artikolojn. La ĉinoj diskonigis ankaŭ en aparta Esperantlingva eldonaĵo la Kanelon Ruĝa Flago (Lin 1976). La diversaj malnovaj kaj novaj eldonaĵoj pri geografio, geologio kaj meteologio (ekz. Delsudo 1927, Geografio 1974, Dudich 1985, Riley-Spolton 1987) kaj la periodaĵo de la geologoj (Geologio Internacia) same donis lokon al akvaj rilatoj. La ĝeneralaj sciencaj periodaĵoj Scienca Revuo kaj Sciencaj Komunikaĵoj publikigis multajn akvoferajn, akvoingenerajn artikolojn, ekz. pri la kanalo Elbo-Odero, la Danuba barajsistemo Gabĉikovo-Nagymaros, la utiligo de la energio de maraj ondoj, la miksfuaj kloaktuboj, la akvoresursoj de Kubo kaj Mongolio, la hidroelastika simileco, la hidraŭlika modelumado, la faligiloj, la fundamentoj de hidraŭlika kaj hidrologio k.a. Okaze de la Budapeŝta UK en 1966, la hungara Akvofera Ĉefdirekcio (ministerio) eldonis volumeton pri la akvomastromado de Hungario (Wisnovszky-Almásy 1966). La revuo Hungara Vivo aperigis grandnombrajn akvoferajn kaj mediprotektajn artikolojn popularkarakterajn.

Oni povas multobligite ricevi en Esperanto la tutan esprimostokon de la 11-lingva akvomastroma vortaro de KREH\*\*. En la glaciovortaro de la International Association of Hydraulic Research (Starosolszky 1980) troviĝas ankaŭ Esperanto kiel rezulto de kunlaboro de esperantistaj fakuloj el sep landoj. La 70000-vorta Hungara Esperanta Vortaro aperonta en 1989, inter siaj 18000 natursciencaj kaj teknikaj esprimoj enhavas ankaŭ multajn akvoferajn (Szerdahelyi 1989). Prezentas multajn akvoferajn konceptojn la Esperanta Bildvortaro (Eichholz 1988), kiu estas la Esperanta versio de la Duden Bildwörterbuch, kaj same la vortaroj pri ŝoseoj, pontoj, fervojo, meteologio, aperintaj kelkajn jarojn post la dua mondmilito, kaj kompreneble la Plena Ilustrita

Vortaro de Esperanto kun Suplemento (Waringhien 1988). Foje eĉ en la beletro — fone — havas rolon la hidrotekniko (Nemere 1986).

Ĉiu ĉi relative malgranda literaturo jam absolute sufiĉas por pruvi ke estas nenia obstaklo kontraŭ kultivi en Esperanto ankaŭ la sciencojn pri akvo. Kaj la sama estas la situacio pri aliaj sciencoj.

## KONKLUDOJ, TASKOJ

Ĉar en ĉiuj sciencoj la terengajno de Esperanto koncentriĝas ĉefe al la lasta jardeko, do tio estas la tendenco de la hodiaŭo. Kaj se ni vidas, ke — kvankam post longa rezistado — la evoluintaj landoj de la mondo jam enkondukis aŭ enkondukas la internacian "lingvon" SI\*\*\* de la fizikaj mezurunuoj, tiam — eĉ en la ne tro fora estonteco — ni certe povas kalkuli je la akcepto de la tutvalora lingvo vere internacia, do Esperanto, kiu ja enhavas ankaŭ SI, sed krome kapablas esprimi la tutecon de la scienco kaj tekniko.

Ĉio ĉi tamen ne okazos aŭtomate. Kvankam la akcepto de internaciaj lingveroj (kiel SI, internaciaj trafiksignoj kaj pli kaj pli da internaciaj kaj aliaj normoj) preparas fekundan terenon al la akcepto de kompleta internacia lingvo, por la esperantistoj estas povo, indo kaj devo rapidigi tiun procedon. La povo ekzistas pro la realaj eblecoj disvastigi Esperanton en la mondo, la indo signifas ke post sukcesoj ankaŭ mem la esperantistoj ĝuos la avantaĝojn de la pli vaste uzata internacia lingvo, dum la devo signifas moralan devon por la plibonigo de la vivkondiĉoj de la tuta homaro, per la uzo de Esperanto.

Ĉi-momente, sed tiu ĉi tendenco validos ĉiam ankaŭ en la estonteco, la plej gravaj kaj efikaj farenadaĵoj de la esperantistaj sciencistoj, teknikistoj kaj aliaj fakuloj dividiĝas en du taskarojn:

1. Senĉese, zorge, konsciencie kaj intense evoluigi la Esperantan

faklingvon kaj

2. saĝe, strategie, kaj diplomate propagandi, instrui kaj pli kaj pli enkonduki, uzi kaj uzigi Esperanton enkadre de neesperantistaj sciencaj-fakaj medioj (esplorinstitutoj, universitatoj, industriaj entreprenoj, fakaj konferencoj, internaciaj fakaj-komercaj traktadoj k.a.).

Taskaro n-ro 1 signifas aktivan agadon interne, n-ro 2 signifas aktivan agadon ekstere. Vera progreso ne eblas, se ne ambaŭ terenoj estas samtempe kultivataj, ĉar ili ebligas kaj plifortigas unu la alian.

Plej sukcesaj povas esti grupigoj kun sufiĉaj unulkaj fortoj aŭ "kernoj" (samcelaj, spirite kapablaj homoj koncentritaj unuloke kaj financa fonto akirita samloke, kiuj kune certigas ian minimuman, sed jam valoran, krome daŭran, do seninterrompan agadon, al kiu povas kaj espereble pretas age kaj finance kontribui poste ankaŭ alilandaj samcelanoj). Havu iu la plej bonan ideon, se li aŭ ŝi volas realigi ĝin nur pere de esperataj alilokanoj, eĉ alilandanoj kaj surbaze de mono esperata nur de aliaj lokoj, la fiasko estas certa. Kelkmembra estraro de UEA kaj kelkmembra personaro de la Centra Oficejo de UEA ja povas kaj devas kolekti kaj disradii informojn, konkludi kaj rekomendi pri plej gravaj agadirektoj kaj tre escepte kaj tre modeste finance kontribuati al tre malmultaj kaj tre merithavaj agadoj, sed pli konkrete fari kion ajn en kvin kontinentoj ĝi ne kapablas.

Kiel ĉies, ankaŭ nia estonteco estas la junularo. Do ni instruu Esperanton al universitataj studentoj. En nia epoko la scio de fremdaj lingvoj estas jam baza postulo por scienca kaj teknika (kaj ĉiaspeca faka) agado. Tamen fakte nur tre malmulte da junuloj kapablas uzeble alproprigi fremdan lingvon en la mezlernejo. Lerni fremdan lingvon ja oni povas eĉ dum la universitataj jaroj, sed tio bezonas multe pli da tempo ol disponeblas. Tion helpas Esperanto. Ni jam havas pruvojn (Frank k.a. 1981, Frank 1988) ke lerni unue Esper-

anton kaj poste alian fremdan lingvon, kune bezonas malpli da tempo ol lerni nur tiun fremdan lingvon sola. Do eĉ kiu ne interesiĝas pri Esperanto, povas profiti el ĝia lernado. Ni devas nur lin konvinki. Se poste li (aŭ ŝi) tamen fariĝos esperantisto kaj eĉ aplikos Esperanton en sia fako, tion ni ja ne povas malhelpi. Tiu metodo estas ĝuste la plej aktuala!

Ni devas konscii, ke en la nuna mondo la natursciencoj kaj tekniko estas la aferoj kies ekspluato en ĉiuj mondpartoj kaj landoj egale konsideratas kiel antaŭkondiĉo de socia evoluo kaj samtempe protekto de la viva naturo, la vivmedio. La evoluo de la scienco kaj tekniko, la metodoj de ili kaj la lingvo de ili disradias en ĉiujn sferojn de la vivo. Akceptigo de Esperanto en la scienco estas nemalhavebla bazo por la ĝenerala akceptigo de Esperanto kiel komuna lingvo de la tuta homaro en la internaciaj kontaktoj. Ĝuste tion eksplikis la du sciencrilataj rezolucioj de la Universala Kongreso de UEA en Pekino en 1986 kaj en Roterdamo en 1988, respektive.

\* Diplomita konstruĝenero specialigita en hidrotekniko, doktoro de la teknikaj sciencoj, universitata profesoro de hidromekaniko, direktoro de la Akvoingeneria Instituto de la Budapeŝta Teknika Universitato, prezidanto de la Akvomasstruma Komisiono de la Hungara Scienca Akademio, eksperto de la Unuiĝintaj Nacioj pri hidromekaniko, estrarano de UEA pri la scienca aplikado de Esperanto, ricevinto de la premio Verda Kosmo de la Ĉina Scienca Akademio, Membro de la Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino kaj de la Internacia Scienca Akademio Comenius, Uppsala.

\*\* KREH=Konsilio de la Reciproka Ekonomia Helpo (de la socialismaj landoj)

\*\*\* SI=Sistemo Internacia (de la mezurunuoj)

## REFERENCJOJ

Blanke, D. (1985): Internationale Plansprachen. Akademie-Verlag, Berlin.

Budai Ésaías (1802): Régi tudós világ története. Debrecen.

Celebration of the Centenary of Esperanto 1986. Resolution 23C/Res. 11-11. Records of the General Conference 23rd Session, Sofia 8th October to 9th November, 1985-Vol. I: Resolutions.

UNESCO, Sofia.

Csatkai et al. (1976-87): Hatnyelvű geodéziai szakszótár I-VI. Budapesti Geodéziai és Térképészeti Vállalat, Budapest.

Delsudo, A.-Laiho, L. (1927): Austraĵio — lando kaj popolo. Hirt und Sohn, Leipzig.

Dudich E. (1985): Ĉu vi konas la Teron? SEC de UEA, Budapeŝto.

Eichholz, R. (1988): Esperanta Bildvortaro. Esperanto Press, Bailieboro, Canada.

Haszpra, O.— Felső, G.— Blanke, D. (1988): Esperanto — lingvo de la natursciencoj kaj tekniko 1887-1986. Esperanto-Dokumentoj, 25E, UEA, Roterdam.

Frank, H.— Yashovardan — Csiske R. (kompilintoj, 1981): Kibernetiko de la homa lingvo kaj aliaj internacilingvaj aktoj de la IX-a Internacia Kongreso de Kibernetiko de la Association Internationale de Cybernétique (Namur). Hungara Esperanto Asocio, Budapest — Instituto pri Kibernetiko, Paderborn.

Frank, H. (1982): Propedeŭtika valoro de la Internacia Lingvo. Mondo de Universitato, Seulo, (n-ro 2).

Frank-Böhringer, B. (1985): Ekesto kaj celoj de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino. Verlag Modernes Lernen, Dortmund.

Geografio de Ĉinio (1974). Fremdlingva Eldonejo. Pekino.

Gether, I.— Haszpra, O. (1988): Az eszperantó nyelv terjedése a nemzetközi tudományos kapcsolatokban. Hidrológiai Közönlöny nr. 1.

Haszpra, O. (1977): Az eszperantó a tudományos és szakmai életben. Gondolatok a hatnyelvű geodéziai szakszótár megjelenése alkalmából. Földmérő, 12.

Haszpra, O. (1979): An Example of International Scientific Co-Operation. Scientific World 2.

Humblet, J.E. (1984): The language problem in international organizations. International Social Journal, UNESCO, 36-1.

Io Chou (1986) Ĉinio marŝas en la insekta mondo. Ĉina Perspektivo, Pekino.

Katsumori, H.— Makino, S.— Hirata, M. (1986): A Machine Translation System by the Esperanto as a Bridge Language. WGHL Meeting, March 28, 54-9.

Katsumori, H.— Makino, S.— Hirata, M. (1987): Esperanto Vocabulary of Physics Terms. Chubu University, Kasugai, Aichi.

Kent Jones, R.— Dale, J.T. (1977): Language Constraints to Water Resources Utilization. Water Resources Bulletin, October.

Kent Jones, R. (1978): Language Utilization for Improved Information Management. The Necessity of Esperanto. Information Processing and Management, Vol. 14. Pergamon Press.

Kolker, B. (1982): O nauĉnoj informacii, bar'ere raznojaziĉija i jazyke esperan-



to. Ĥimija i ĵiznj, 7.

Konkludoj de la Ahrenshoopa scienca seminario (1987): Sciencaj Komunikajoj, julio.

Lapenna, I. — Lins, U. — Carlevaro, T. (1974): Esperanto en perspektivo. Faktoj kaj analizoj pri la Internacia Lingvo. Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo, Universala Esperanto-Asocio, London-Rotterdam.

Li Kexi (trad. kaj red. 1987): Esperanta-Latina-Ĉina Atlaso de Insekta Morfologio. Ĉina Esperanto-Eldonejo, Beijing.

Lin Min (1976): Kanalo Ruĝa Flago. Fremdlingva Eldonejo, Pekino.

Maul, G.E. (1983): International Scientific Communication — A Stepwise Solution (Editorial). Marine Geodesy, Vol. 7. Nr. 1-4.

Miniero, V. (1980): O Esperanto Nas Escolas Técnicas de Todas as Nações do Mundo. Informatec, Julho.

Munniksma (1973): International Business Dictionary in Nine Languages, kluever, Deventer-Antwerp.

Neergaard, P. (1986): Language barriers and corrosion of communication in science. Neergaard, P.: Seed - a horse of hunger or a source of life. University of Mysore, Mysore — Danisch Government Institute of Seed Pathology for Developing Countries, Copenhagen.

Nemere, I. (1986): La alta akvo. HEA,

Budapest.

Novobilsky, V. (1979): Informatika a problém mezinárodního plánovaného jazyka v období vědeckotechnické revoluce. Sbornik pedagogické fakulty v Usti nad Labem, řada chemická. Státní Pedagogické Nakladatelství, Praha.

ON 798001 (1980): Názvoslovu kožesnických stroju zařízení a nářadí. Vydavatelství U°radu pro Normalizaci a Měření, Praha.

Optimization of Rural Landscapes. Abstracts (1981). IUCN Committee on the Eco-Development of Cultural Landscapes — Ministry of Estonian SSR — Estonian Conservation Society, Tallin.

Ouyang Wendao (1986): The language problem in science and the role of the international language Esperanto. Esperanto Documents 38 A, CED de UEA, Rotterdam.

Peevski, V. (1977): Science et la langue internationale. Monde Scientifique 2.

Riley, D. — Spolton, L. (1987): Vetero kaj klimato de la mondo. UEA, Rotterdam.

Sherwood, B. A. (1979): Universal Language Requirement. Physics Today, July.

Starosolszky Ö. (1980): Multilingual Ice Terminology, Addendum I. Research Centre for Water Resources Development, Budapest.

Stoberski, Z. (1979): International

Scientific Terminology and Neologisms in the course of Unification. Babel, 2.

Szerdahelyi I. (1989): Magyar-Eszperantó Kéziszótár. Akadémiai Kiadó, Budapest.

Sztrabón (1977): Geógraphika, Gondolat, Budapest.

Vörös, C. (1910): Analitika geometrio absoluta. Unua volumo: La ebena Bolyai-a. Kókai, Budapest.

Vörös, C. (1911): Elementoj de la geometrio absoluta. Kékai, Budapest.

Vörös, C. (1912): Analitika geometrio absoluta. Dua volumo: La spaco Bolyai-a. Kókai, Budapest.

Wagner, B. (1987): Esperanto — Sprache als Brücke. Bild der Wissenschaft, 7.

Waringhien, G. (1988): Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto kun Suplemento. SAT, Paris.

Wisnovszky I. — Almásy E. (1966): La akvo kaj la homo en Hungarlando. OVH-VITUKI, Budapest.

Witkam, A.P.M. (1983): Distributed Language Translation. Buro voor Systeemontwikkeling, Utrecht.

Witkam, A.P.M. (1986): Distribuierte Übersetzung. Rechentechnik-Datenverarbeitung, 10.

Zheng Din-zhi (red, 1986): Nomenklatur de ĝeneralaj ornamfloraj vegetaĵoj. Guangxi-a Botanika Instituto, Guilin-a Esperanto-Asocio. ■

## KORESPONDI DEZIRAS

\* 26-j. instruisto dez. kor. tm., interŝ. pm., pk. kaj kolekti diversajn cigaredujojn, Skribu al Wang Jiang, 741 Xin Xiang, Ruijin, Jianguxi, Ĉinio.

\* S-ino Zhang Shuying, volas kor. tm. kaj interŝ. informojn pri internacia Esperanto-turismo, ekonomio, komerco kaj akceli reciproke sinceran kunlaboron tiuflanke. Adr.: Huan Bao Ju, Qiqihaer, Heilongjiang, Ĉinio.

\* Gao Zhenxing volas kor. tm. pri ĉt. Esperante, angle kaj japane kaj interŝ. pm. kaj bk. Adr.: 78 Jinghua Bolichang Sushe, Xiaocunzhuang, Qingdao, Shandong, Ĉinio.

\* Okaze de "Internacia Tago de Mondpaco" je 1-a de septembro 1989 aranĝos la esp-grupo Dessau letervesperon kaj ekspozion. Aten-

das salutleterojn, E-aĵojn, desegnaĵojn ktp. por demonstri la disvastiĝon de Esperanto. Ĉiu sendanto ricevos respondon. Bezonas ankaŭ vian salutkarton! Skribu al: s-ro Uwe Heidrich, Augustenstr. 8, DDR-4500 Dessau, GDR.

\* Ĉiam konstante akceptas korespondopropojn kun japanoj, Japana Esperanto-Korespondo-Servo, de KLRG, Sone-higasi 1-11-46-204, Toyonaka-si, 561 Japanio.

\* Sano, bulteno de Ĉeĥa Esperanto Asocio, volonte publikigos anoncojn kaj korespondajn dezirojn de la monda medicinist(ar)o, kaj petojn pri ligoj de amikaj rilatoj. Adr.: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, CS Praha 1, Jiřska 10 - Sano, 11000, Ĉeĥoslovakio.

\* E-Klubo "Blanka Nokto" dez. kor. kun ĉiuj. Adr.: SU-198205, Leningrad, ul. P. Germana 37-7, Sovetunio.

\* Grupo de studentoj 17-j. serĉas korespondantojn tra la mondo. Bonvole skribu al: La Esperanto-Grupo, c/o J. Ibbotson, York Sixth Form College, Tadcaster Road, York, YO2 1UD, Britio.

\* Fevenc Racz, 16-j, dez. kor. kun ĉinaj esp-istoj, interesiĝas pri Gong-fu. Adr.: Godollo, Adam utca 8, 2100, Hungario.

\* 17-j. lernantino serĉas leteramikon, interesiĝas pri sporto, muziko, literaturo kaj turismo. Adr.: Katarzyna Ilczuk, ul Nowotki 9/47, 08-110 Siedlce, Pollando.

\* 17-j. lernantino serĉas leteramikon, interesiĝas pri sporto, muziko, literaturo, turismo kaj filmo. Adr.: Ewa Ilczuk, ul Nowotki 9/47, 08-110 Siedlce, Pollando.

\* 39-j. konstruĝeniero dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj. Skribu al: Klaus Kranz, Neue Strasse 31, Cottbus, DDR-7512.

# MIA HEJMO EN PEKINO

de ILARIO FIORE\*

Fotoj de BAI XIN



Ges-roj Fiore en sia hejmo

**G**ERTRUDE Stein foje diris al Ernest Hemingway: “Usono estas mia patrujo, Parizo — mia hejmo.” Eble ankaŭ mi povus tiel diri al aliaj. Mi scias nur, kiu lando estas mia patrujo, tamen mi ne povas diri, en kiu urbo estas mia hejmo, ĉar tro multfoje mi transloĝiĝis kaj mi certe transloĝiĝos. Mia nuna hejmo estas en Pekino, kiu estas plej ŝatata de mi, se ĝi ne estas lasta loĝejo. Mi luis la apartamenton nur post atendado de unu kaj duona jaroj en hotelo. Ĝi troviĝas en la plej supra etaĝo de alta domo en ambasadoreja

kvartalo oriente de Jianguomen (Ĝjangŭomen)-pordego. La fenestroj de mia salono rigardas al la antikva observatorio, kie laboris fama misiisto pastro Matteo Ricci antaŭ 400 jaroj. Mia apartamento ne estas granda, tamen racie strukturita, vasta, lumplena kaj komforta. En ĝi oni sentas sin vivanta en sia propra spaco. Spaco en Ĉinio, precipe en ĝiaj urboj, estas prikonkurata. Finfine mi adiaŭis tiun kokejsimilan unuĉambran dormejon en hotelo, en kies spaco longa je 5 m, larĝa je 4 m kaj alta je 3 m kunpremiĝis dukuŝa lito, skribota-


blo, libroj, vestoj kaj telefono. Tiu ĉambro servis kaj kiel dormejo, kaj kiel leĝejo kaj salono. Vivo en tia loĝejo estis sufoka. En nokto oni vere emus transsalti muregon de la Imperiestra Palaco kaj kuregi en ĝian ĝardenon por enspiri tie freŝan aeron.

Mi konfesas, ke mi estas feliĉa, kiam mi en mia salono rigardas tra la fenestroj. Se parodi al Gertrude Stein, mi povus diri, ke Italio estas mia patrujo, kaj Pekino — mia hejmo; en Pekino mi jam sentas min kiel hejme. Tio estas, ke mi tie vivas kaj laboras plezure. Tie mi povas verki kviete. Mi amikiĝis kun multaj homoj. Ili ŝatas konigi al mi la 5000-jaran historion de Ĉinio kaj ne evitas diri mankojn de sia nacio. Ili aj hejmoj estas malfermitaj al mi. Ĉiam ili regalas min per siaj plej bonaj manĝaĵoj. En nia ŝanĝigema mondo mia hejmo en Pekino jam fariĝis mia plej komforta ŝirmejo. Ĉinaj arkitektoj utiligas spacon pli arte ol italaj urboplanistoj. Laŭ registara informo, lastatempe finkonstruitaj domoj havas plank-areon de centoj da milionoj da kvadrataj metroj. Ili ne plu estas tiaj monotona kvin- aŭ ses-etaĝaj domaĉoj kun mizeraj ŝtuparoj kaj senutilaj larĝaj koridoroj, sen liftoj. Simile al la grandioza vestiblo de la Pekina Flughaveno, tiuj domoj, kvankam kelk-jaraj, aspektas kvazaŭ 20-jaraj, pro la malbon-kvalita materialo. La interna garnado de la novaj domoj estas ne malbona. La arango de kuirejo kaj banejo estas racia. Plej bone garnita estas la


kuirejo, kun 2 bovlolavujoj kaj du kromaj cementaj kuvoj. Oni povas lavi vestojn en la kuvoj, se lavmaŝino mankas.

En vintro kaj printempo vento blovas el trans la Granda Muro. La blua ĉielo super Pekino estas klara, kvankam la tero apartenas al polva mondo. Tra fenestra vitro mi vidas Jingshan(Ĝingŝan)-monteton en malproksimo, ok-angulajn turojn de la Imperiestra Palaco je sagopafo for de ĝi, la duan urban rondvojon laŭ iamaj urbomuregoj, sub kiu estas metroo, navetantajn biciklojn, aŭtojn kaj ĉeval-ĉarojn sur trefkruciĝa vojo ĉe la antikva observatorio kaj vicojn da infanoj irantaj al lernejoj. Vere okulplaĉa bildo! Mia hejmo sidas en tia helo. Se eventuale io iras ekster ordo, pri tio kulpas ni, kaj ne ĉinoj. Ĉu elektristoj, ĉu tubistoj, ĉiuj senprokraste venas post mia voko, kaj ili venas duope, iam triope, portante sakon kun instrumentoj kaj bluan antaŭtukon aŭ bluzon. Ili estas ĝentilaj, laboras senbrue, venas kaj foriras kun rideto.

Vespere aŭ nokte, kiam mi rigardas eksteren en mallumo, mi sentas min kvazaŭ sur ĉielskrapan-to ĉe Kalinin-strato de Moskvo aŭ Parko-avenuo de Nov-Jorko. La dormanta urbo dronas en maro de blua lamplumo ĝis leviĝo de nokta kurteno. La oranĝa lamplumo sur la dua urba rondvojo ĉirkaŭprenas la junan kaj maljunan urbon. Estas entute 3 rondvojoj. Pekino en nokto aspektas kiel granda flughaveno, kie neniu aviadilo ekflugas aŭ surteriĝas, sed sur la kurejo lampoj hele lumas. Mi rigardas norden kaj vidas lampojn sur trefkruciĝo de la dua rondvojo, trans kiu kuŝas la malnova urbo konstruita de mongoloj. Jen sceno kun perfekta lumefekto. Pekino en nokto pli ol en tago pravas sin urbego kun dek milionoj da loĝantoj. La lampoj antaŭ Tian'anmen-pordego prilumas ne nur la Popolan Halon kaj la placon plej grandan en la mondo, sed ankaŭ la parkajn pordegojn ambaŭflanke de la Imperiestra Pa-



S-ro Ilario Fiore (dekstre) kaj la ĉina kultura ministro Wang Meng



S-ro Ilario Fiore inter ĉinaj fiŝistoj


laco. Sur mia balkono mi rigardas suden trans la Pekina Stacidomo kaj povas vidi la Ĉielan Altaron. Se en la Aŭtunmeza Festo de ĉinoj la plena luno brilas sur la sennuba ĉielo, mi povas vidi la rondan tegmenton de la Riĉrikolta Preĝejo en la Ĉiela Altaro. Kia mirinda spektaklo!

Tia estas mia hejmo en Pekino. Mi vivos tie kelkajn jarojn, plenumante mian mision en Ĉinio. Post tio mi almenaŭ estos kvalifikita verki libron kun la titolo "55 monatoj en Pekino". ■

\*La aŭtoro laboras en Pekino kiel raportisto de la Itala Elsenda kaj Televida Kompanio.

# ĈARMA GALERIO DE NATURAJ ARTAĴOJ

Fotoj de HUANG SHIQING



Vilaĝo en pitoreska loko

**E**N la nordokcidenta kaj sudokcidenta Hunan kaj la norda Guangxi de Ĉinio sterniĝas zono de naturaj pejzaĝoj, 800 km. longa kaj 35-100 km. larĝa. Ĝi situas en la loko, kie la Yunnan-Guizhou-a Altebenaĵo limtuŝas la Dongtinghu-ebenaĵon. Tie staras apikaj montoj kaj kuŝas profundaj valoj. En la pasinteco, pro malfacila trafiko la lokon vizitis tre malmultaj homoj. En la 80-aj jaroj ekfunkciis la Zhicheng-Liuzhou-a Fervojo kaj ĝin frekventis pli kaj pli da homoj. En tri monatoj ni faris esploron en ĝi kaj spertis la ĉarmecon de la galerio de naturaj artaĵoj.

En la nordokcidenta Hunan fluas Maoyan-rivero longa je ĉ. 50 km. Ambaŭborde de la rivero staras montpintoj kaj densaj arboj. Ŝip-veturante sur la rivero, oni povas vidi la klaran akvon torentanta kaj ondojn impetantaj. Proksime de la rivero zigzagas Yinghua-valo 3 km. longa kun krutaĵoj altaj pli ol 200 metrojn kaj la fundo de la valo malpli ol tri metrojn larĝa. Ĝi aspektas kiel fendo sur la tero. La

krutaĵoj ie glatas kiel spegulo kaj alie malglatas mirinde. De sur krutaĵoj falas akveroj, kiuj formis kaskadon ĉe la rokmuroj kaj rojon murmurantan ĉe la fundo. En la valo karesas friska venteto. Vere fea lando!

Okcidente de la rivero fluas Mengdong-rivero longa 200 km. Ambaŭborde de ĝi belas la pejzaĝo, kantas birdoj, muĝas kaskadoj kaj tintas fontoj. La rivero kiel rubando ornamas verdajn montojn.

En la zono troviĝas centoj da belaj kaskadegoj. Sole en la vilaĝo Dehang vidiĝas 13 kaskadoj, kiuj plejparte altas pli ol 200 metrojn. Inter ili la plej grandioza estas la kaskadaro Hangxiaxi el 7 akvofaloj altaj 200 m, kiuj aspektas kiel flugantaj drakoj.

En la loko abundas fontoj. Oni povas vidi ilin ĉe vilaĝoj, apud vojoj, sur montoj, ĉe bordoj aŭ sur insuletoj en riveroj. La freŝa kaj dolĉa fontakvo servas al turistoj kiel bonega trinkaĵo. Se oni lavas sin en termofontoj, oni do povas facile mallaciĝi.

La galerio de naturaj artaĵoj distingigas per belaj montoj kaj riveroj. La pitoreskejo Zhangjiajie (Ĝangĝjaĝje), Tianzi-monto kaj Suoxi-ravino estas abundaj je kuriozaj montpintoj. Tie staras pli ol 4000 kuriozaj montpintoj. Laŭ ŝanĝiĝo de vetero la montoj, montpintoj, arboj kaj riveroj jen brilas jen kovriĝas de nebulo.

En Shentangwan de Tianzi-monto etendiĝas ravino profunda je 700 metroj. En pluva tago el ĝi leviĝas nebulo kaj aŭdiĝas animskua bruado. Ĝis nun neniu kuraĝas sondi la misteron de la fundo.

Sur la apika krutaĵo de Tianmen-monto 1517 m super la marnivelo estas Tianmen-groto. Pro ĝi la monto ricevis la nomon. La bela Tianmen-monto estas honorata kiel modelo de montoj.

Grandarea ŝtonarbaro staras en Yongshun-gubernio en la okcidenta Hunan-provinco. Sur la altaj, kuriozaj ŝtonpintoj kreskas lianoj punktataj de ruĝaj floroj, kio plibeligis la ŝtonarbaron.

En la zono ne mankas kavernoj. La miloj kaj dekmiloj da kavernoj formis la subteran mondon de la zono. La groteskaj kavernoj plejparte longas milojn da metroj, iuj eĉ dekojn aŭ centon da kilometroj. Shuanghe-kaverno de Tianzi-monto havas longon je 300 km. Ĉie en la kaverno vidiĝas diversformaj stalaktitoj, kiuj donas kuriozajn spektaklojn. Ĉe la frapo el ili aŭdiĝas muzika sono kvazaŭ el antikva ĉina instrumento. En multaj kavernoj vidiĝas montoj, riveroj, kaskadoj kaj artefaritaj pontoj. Granda nombro da kavernoj kun primitiva formo prezentas al ekspedicianoj idealan medion.

La regiono de la Sanjiang-a Dong-nacia Aŭtonoma Gubernio ĝis ambaŭ bordoj de Rongjiang-rivero de Liuzhou, Guangxi, estas tipa karsta regiono. La verdaj montoj donas siajn ombrojn en la riveron. En densa bambuaro kaŝiĝas domoj de dong-oj. Promenante sur la bordoj kaj aŭskultante kantaĵojn el kamparanaj domoj kaj blekadon de bovoj kaj ŝafoj ĉe bambuoj, oni sentas senkomparan ĝojon.

En la primitivaj arbaroj de la zono kreskas miloj da specoj de lignecaj plantoj. Ĝi estas unu el la lokoj, kie plej dense kreskas antikvaj ĉinaj plantoj. Tie etendiĝas flaŭroj originalaj kaj raraj en la mondo. Aparte menciindas kataĵo (*Cathaya argyrophylla*). Ĝi kreskas sole en Ĉinio. Antaŭe ĝi nombris malpli ol 1000, sed nun estas trovitaj grandareaj kataĵaroj en Wanfeng-monto de Hunan kaj Huaping de Guangxi. Ili, kiel valora natur-riĉfonto, prezentas naturan bazon por studi la ekologian medion.

Ĉie en la zono vidiĝas antikvaj kasteloj kaj vilaĝoj. La antikva kastelo Alahuangsiqiao de Fenghuang-gubernio estas ŝtona urbo kun historio de 1000 jaroj. Por iri ĉirkaŭ ĝi oni bezonas nur 20 minutojn. Ĝi estas ja malgranda urbo, rara en la mondo. La antikva urbeto Wangcun kuŝas ĉe la buŝo de Mengdong-rivero. En la urbo kondukas 2000-jara ŝtonplata strato longa je 2.5 km. La ŝtonplatoj estas sufiĉe glataj pro la longtempa paŝado. La vilaĝo



Strateto en antikva urbeto

Jidou ĉe la ravino Dehang de Jishou estas loĝata de mjaŭ-oj. La konstruaĵoj en ĝi plejparte estas bluj. La domoj, kortoj, kortomuroj kaj eĉ padoj estas faritaj el blujaj ŝtonpecoj. Proksime de la vilaĝo Jidou sidas la vilaĝo Xingfu kun aparta trajto. Ĉiuj loĝdomoj kun karaktero de la mjaŭ-a arkitekturo estas subtenataj de kolonoj. La konstruaĵoj en Xizhen de la Tongdao-a Dong-nacia Aŭtonoma Gubernio estas faritaj ĉefe el abia ligno, sen briko kaj tegolo. La tamburaj turoj kaj vent-pluvŝirmaj pontoj en la dong-aj vilaĝoj estas konstruitaj ekskluzive el abia ligno kunigitaj per tenonoj. Ili havas gravan valoron por studi la socian vivon kaj arkitekturon de dong-oj.

En la zono loĝas, krom hanoj, ankaŭ la nacimultplimultoj ĝuang-oj, jaŭ-oj, ji-oj, dong-oj, mjaŭ-oj, suj-oj, buji-oj kaj tuĝja-oj. Ĉiu nacio havas siajn proprajn morojn kaj tradician kulturon. En la jaro ofte okazas naciaj tradiciaj aktivadoj, kiel ekzemple, la kanta festivalo "La Tria de la Tria Monato" de ĝuang-oj, luŝeng (bambua blov-instrumento)-festivalo, leon-danca festivalo kaj aŭtuna foiro de mjaŭ-oj, petarda festivalo de dong-oj. En ĉiu festotago oni povas ĝui diversnaciajn kantojn kaj dancojn kaj apreci sportan konkurson. Gejunuloj esprimas sian amon unu al alia per kanto. Tutan nokton regas ĝoja kriado kaj fajrajkrakado. Ĉiuj, ĉu eksterlandanoj ĉu ĉinoj, dronas en maro de gajeco kaj ĝuas belajn tagojn. ■




Tianzi-monto en nebuio



Pejzaĝo de Miaoyan-rivero

Stalagmito kaj stalaktito en karsta kaverno



Muzikoido de mjaŭ-oj



# Arta Reciproko

de YANG GUOQIANG

Fotoj de YE RUIFU

**I**UN someran nokton de 1988, "reĝo de kantistoj" s-ro Placido Domingo prezentis en la Popola Halo de Pekino. Lia kantado ravis dekmilon da aŭskultantoj, kiuj rekompencis lin per tondra aplaŭdado.

En 1987, la Ĉina Junula Simfonia Orkestro unufoje turneis en Britio. Ĉe la fino de la prezento s-ro Jeffery How, ministro de eksteraj aferoj de Britio, kaj ĉiuj spektantoj stariĝis kaj laŭte kantis la solenan "Marŝon de Armeo".

Tio estis du kortuŝaj scenoj el la arta reciproko inter Ĉinio kaj aliaj landoj en la pasintaj dek jaroj. Ekde 1978, kiam Ĉinio larĝe malfermis sian pordon al la eksterlando, multaj alilandaj artistoj vizitis Ĉinion kaj, samtempe kun tio,

granda nombro da eminentaj ĉinaj artistoj montris ĉinan arton eksterlande.

## INTERVIZITO

Aprezi fremdlandajn artojn fariĝis parto de la vivo de ĉinoj. En la dek jaroj, per la kanaloj oficialaj, popolaj kaj komercaj, dekmil artistoj de 330 fremdlandaj artaj grupoj vizitis Ĉinion. La ciferoj estis egalaj al tiuj de la antaŭaj 30 jaroj.

Ĉinion vizitis mondfamaj virtuzoj Herbert von Karajan, Ozawa Seizi, Yehudi Menuhin, Luciano Pavarotti kaj Julio Iglesias, kaj ankaŭ la Berlina Filharmonio, Fildelfia Harmonio, Reĝa Baleta Trupo de Britio, Baleta Trupo de la Pariza Opero de Francio... En la

pasinta julio Domingo kaj la hispana artista trupo prezentis en Pekino, kio faris sensacion en la urbo. La hispana ambasadoro en Ĉinio diris kun admiro: "La artistoj faris en la 48 horoj pli multe ol mi kiel diplomato en la 20 jaroj."

Ankaŭ tradiciaj ĉinaj artoj ravis eksterlandajn spektantojn per siaj freŝa nacia gusto, alta nivelo kaj forta vivetoso. En tiu tempo la Ĉina Impresaria Kompanio sendis alilanden 550 artistajn grupojn el proks. 20 000 personoj. En 1982, la Pekin-opera Trupo de Shandong-provinco partoprenis en la Arta Festivalo de Singapuro. La unufojan prezentadon la spektantoj rekompencis per 90 florkorboj, kaj loka ĵurnalo raportis pri la prezentado sub la titolo "Nova rekordo de la Arta Festivalo: Sun Wukong en Pekin-opero kirlis la universon, kaj gajnis 106-foje tondran aplaŭdadon!" En 1984, la Kanto-danca Ensemblo de Gansu-provinco prezentis en Japanio la dancan dramon "Sur la Silka Vojo". Antaŭ la alveno de la ensemblo, la biletoj por 33 prezentoj jam estis elĉerpitaj. Japanaj ĵurnaloj kaj revuoj publikigis ĉirkaŭ 100 raportaĵojn kaj recenzojn pri tio.

## MULTAJ SPECOJ DE ARTOJ POR RECIPROKO

En la arta reciproko inter Ĉinio kaj aliaj landoj estis diversaj ne nur la formoj de artospecoj, sed ankaŭ repertuaroj. Inter ili ĉinaj akrobataĵoj estis la plej ŝatataj.

En 1987, la malmulte konata Akrobata Trupo de Yunnan-provinco turneis 100-foje en 10 monatoj en Meksikio. La cirko kun 3 000 sidlokoj estis ĉiufoje plenkplena. Tio ja estis rekordo por ak-

Impresarioj de FR Germanio gastas en la Akrobatika Trupo de Wuhan.





robatado en la loko. Veterano de la meksikia akrobatajarto diris kun emociigo: "Mi okupiĝis pri akrobataĵo dum duona jarcento. Tiu arto ne havis altan lokon en la okuloj de la homoj, kaj ĝi estis fremda al la mondumo kaj ĵurnalismo. Sed nun, la damo de lia prezidenta moŝto honoris nin per sia ĉeesto. Estas la ĉinaj akrobatoj, kiuj gajnis por ni la honoron kaj socian lokon."

Kiam ĉinaj akrobatoj foj-foje gajnas premion eksterlande, dramo, simfonio kaj baleto, kiuj devenis de la Okcidento, nun estas bone poseditaj de ĉinaj artistoj kaj ree prezentiĝas en sia hejmloko. La Pekina Popola Arta Teatro prezentis en la Federa Germanio kaj Francio la dramon "Tetrinkejo". La Ĉina Ŝtata Simfonia Orkestro turneis de la orienta bordo al la okcidenta en Usono traveturinte 8 000 kilometrojn kaj prezentis en la graciaj muzikaj haloj Centroj de Lincoln kaj Kennedy, kiuj akceptas nur mondnivelajn orkestrojn.

Prezenti alilandajn dramojn fariĝis unu el la karakterizaĵoj de la arta reciproko. Ŝanhajaj artistoj prezentis en Britio la faman dramon "Macbeth" de Ŝekspiro, dum la brita opero Kent prezentis la ĉinan dramon "Orfo de la Familio Zhao"; la fama usona artisto Charleton Heston reĝisoris en Ĉinio la usonan dramon "Ribelo de Soldatoj", dum ĉina artisto reĝisoris en Sovetunio la ĉinan dramon "Vizito de Mortinto al Vivantoj".

Tiuj benefikaj interfluoĵoj plene montriĝis ankaŭ en la aktiva kaj preferata partopreno de ĉinaj artistoj en internaciaj altnivelaj konkursoj. Tio pruvis la memfidon kaj talenton de la ĉinaj artistoj, kiuj havas la kuragon konkuri kun la mondfamaj artistoj. De 1980 ĝis 1988 ĉinaj artistoj gajnis 286 medalojn en internaciaj konkursoj de violonludo, pianludo, voĉmuziko, baleto kaj akrobataĵo. Inter tiuj estis 83 oraj medaloj. Dank' al tio, elmontriĝis la talento de multaj junuloj.



Famuloj de la japana kultura rondo gratulas la ĉinajn geaktorojn pro ilia sukcesa prezentado de la dramo "Tetrinkejo" en Japanio.



Pekin-opera aktoro el la Interna Mongolio dankas la rigardantojn post prezentado.

## PLI KAJ PLI DA KOMERCAJ PREZENTOJ

La komerca kanalo estis nova vivipova formo en la prospera disvolvigo de la ekstera interfluo de la ĉinaj artoj en la pasintaj dek jaroj. La elcento de la senditaj artistaj grupoj kun tiaj karakteroj okupis pli kaj pli grandan parton.

Ekde 1979, kiam oni komencis komercan prezentadon, oni sendis ĉe la komenco nur kelkajn aŭ dekkelkajn artistajn grupojn, sed nun jam centon. La Ĉina Impresaria Kompanio sendis en la lasta jaro al

pli ol 60 landoj kaj regionoj 80 artistajn grupojn, kaj ĉirkaŭ 70 el ili iris per tiu kanalo.

La komerca prezentado akcelis artan konkuron kaj gajnis bonan ekonomian profiton. La pando Weiwei de la Ŝanhaja Akrobata Trupo kaj la pando Yingying de la Wuhan-a Akrobata Trupo turneis en Japanio, Tajlando kaj Kanado, kio ne nur kontentigis spektantojn, precipe infanojn de tiuj landoj, sed ankaŭ gajnis milionojn da usonaj dolaroj, kiuj estis uzataj por projekti rarajn sovaĝajn bestojn. ■





La Ensamble de Xi'an de Cínio sur la Rega Placo en Nederlando



Domingo en Pekino

Pavarotti en la opero "La Boheme" en Pekino



La Kantona Akrobatika Trupo en Hispanio

● La nacia produktovaloro de Ĉinio en 1988 estis 1369.4 miliardoj da juanoj, je 11.2% pli multe ol tiu de 1987; la nacia enspezo estis 1133.8 miliardoj da juanoj, je 11.4% pli multe ol tiu de 1987.

● Laŭ invito de Yang Shangkun (Jang Ŝangkun), la prezidanto de la Ĉina Popola Respubliko (ĈPR), sovetunia gvidanto Gorbačov faros oficialan viziton al Ĉinio maj-meze.

● Dum 1988 Ĉinio gastigis

31 270 000 alilandajn turistojn, je 17% pli multe ol en 1987. Ĉi-jare ĈPR festos sian 40-jariĝon kaj pro tio oni faros unikajn turismajn aranĝojn tra la lando.

● La satelito "Azio" n-ro 1, farita de Usono, jam estis enspacigita de ĉinaj raketoj. Ĝi fiksiĝis super sudorienta Azio. Ĝi estas la unua regiona telekomunika satelito en Azio. Ĝia lanĉiĝo markas la eniron de Ĉinio en administran kaj lanĉan merkaton de internaciaj telekomu-

nikaj satelitoj.

● La Banko de Ĉinio, kies kapitalo estas 118.745 miliardoj da usonaj dolaroj, viciĝas en la 20-a loko el la 3000 grandaj bankoj de la mondo.

● En 1988 la valoro de podetala vendo en Ĉinio superis 740 miliardojn da juanoj, je 27.8% pli multe ol tiu de 1987. 1988 estis jaro de plej rapida kresko tiuflanke post 1949.

● La 560-mil-kvadratkilometra Tarim-baseno en Xinjiang (Ŝingĵang) estas la plej granda sedimenta baseno de Ĉinio. Laŭ takso, la baseno rezervas 10 100 milionojn da tunoj da petrolo kaj 830 milionojn da kubmetroj da natura gaso. Ĉi-jare kaj venontjare Ĉinio investos 1400-1500 milionojn da juanoj por ekspluati tieajn oleon kaj gason.

● Lastjare Ĉinio produktis 59 220 000 tunojn da ŝtalo. La ŝtata plano jam estis superplenumita.

● La naturaj kaŭĉuk-plantejoj en Ĉinio kovras 600 000 hektarojn kun jara produktokvanto de 240 000 tunoj. Ĉinio fariĝis la kvara granda kaŭĉuk-dona lando.

● Ĉi-jare en la meza parto de Usono grandaree plantiĝos hibrida raso de neglueca long-grajna rizo, kiu estis kultivita de la Esplor-Centro de Hibrida Rizo de Hunan-provinco, Ĉinio.

● En Ĉinio oni vaste popularigas utiligon de sun-energio. Aperis ne nur nov-generaciaj sunaj fornoj kaj sunaj akvo-varmigujoj, sed ankaŭ sunenergiaj domoj, sekigujoj, banejoj, naĝejoj, elektrejoj, pilojoj kaj aliaj dekoj da novaj teknikoj kaj produktaĵoj.

● Lastatempe oni konstatis en Guizhou (Gujōu)-provinco, Ĉinio, la plej talium-riĉan minejon. Taliumo estas valora metalo, vaste uzata en elektroniko, medicino, altenergia fiziko kaj aliaj kampoj.

Kaŭĉukarba kultivejo en Jinghong-gubernio de Yunnan-provinco



Tibetano Chilee Duoĵie, reveninta patrolanden en 1986, vivas kune kun siaj edzino kaj infanoj. Jen li kaj liaj nepoj.



● Antaŭ nelonge Jin Qingmin (Ĝin Ĉingmin), ĉina geologo, trovis en Antarkto fer-ercojn; la erc-zono longas je pli ol 20 km.

● La 26-an de januaro oni metis angulŝtonon por la Centro Zhongshan (Ĝongŝan). La centro distancas de Pekino je 12553.16 km. kaj de la suda poluso je 2303 km.

● Dum la lasta jardeko Ĉinio akceptis pli ol 22000 tibetanojn, kiuj revenis el eksterlando por viziti la patrujon kaj siajn parencojn. El tiuj tibetanoj 1600 laŭ sia propra volo fiksloĝiĝis en Tibeto kaj oni bone zorgis pri ilia vivo.

● Favore al la 11-a Azia Sportkunveno okazanta en Pekino en 1990, s-ro Huo Yingdong, fama patrioto en Hongkong, donacis 100 milionojn da HK-dolaroj al konstruado de instalaĵoj por la sportkunveno.


● En 1988 ĉinaj artistoj kaj iliaj verkoj gajnis pli ol 140 orajn, arĝentajn kaj aliajn premiojn en 80 internaciaj kulturaj intersanĝoj. Tiuj premioj kovras muzikon, dancan, akrobatikon, beletron, pentradon, skulptadon, belskribon, kinon k.a.

● En 1989 Ĉinio eldonis 1540 specojn da ĵurnaloj. Eldoniĝis sume 3500 specoj da ĵurnaloj, inkluzive de tiuj eldonitaj de fabrikoj, minejoj, lernejoj k.a.

● Dum 1987-1988 42481 studentoj el la ĉina kontinento lernis eksterlande. La nombro de tiaj ĉinaj studentoj estas la plej granda en la mondo.

● Post sia elteriĝo terakotaj soldatoj kaj ĉevaloj en la maŭzoleo de la Unua Imperiestro de Qin(Ĉin)-dinastio (221 -206 a.K.) jam vizitis dek landojn kaj regionojn ekde 1980. Ili rigardis 7 milionojn da homoj. Oni honoris ilin kiel "simbolon de la ĉina antikva civilizacio".

● Laŭ la dekmil-kilometra zono de Wusuli-rivero en nordorienta Ĉinio ĝis Altaj-montaro en la Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Re-



La akrobataĵo de ĉinaj artistoj gajnis oran medalon en la Dua Monda Akrobatika Festivalo en Parizo.



Sovetunia kamiono plena de ŝtalaĵoj eniras ĉinan landliman pordon en Horgos, Xinjiang.

giono troviĝas 15 landlimaj komercaj havenoj. Tio estas la "dua malfermita zono", kiu servas ĉefe por komercado kun Sovetunio, Mongolio kaj orient-eŭropaj landoj.


● Lastatempe Ĉinio kaj Japanio decidis fondi kunlaboran grupon por esplori la aktivadon de "ruĝaj fiŝoj" vivantaj en Manas-lago de Xinjiang, Ĉinio. Tiaj fiŝoj longas je dek metroj kaj pezas je unu tuno.

● Qingyuntang (Ĉingjuntang) estas speciala butikoj de antikvaj moneroj kaj monpapiroj en Liulichang, kultura strato de Pekino. Lastatempe ĝi ekakceptis monerokolektantojn. La unuaj venditaj

antikvaj moneroj kaj monpapiroj estis faritaj en diversaj tempoj, de Shang-dinastio (ĉ. 16 jc — 11 jc a.K.) ĝis la moderna tempo, en 340 specoj de 50 kategorioj.

● En 1988 Ĉinio spertis 37 tertremojn almenaŭ 5-gradajn. La tertremoj okazis ĉefe en la okcidenta parto de la lando. Fakuloj opinias, ke evidentiĝas plioftiĝo de tertrema aktivado sur la ĉina kontinento kaj ke la plioftiĝo povos daŭri ĝis la fino de ĉi jarcento.

● Ĉinio progresas en teknologia enkonduko. Lastjare 440 kontraktoj tiu-rilate estis subskribitaj, kun komerc-valoroj de 3550 milionoj da usonaj dolaroj.



# Savŝipo sur glacia maro

Fotoj de WANG JINSHENG

En 1969 Ĉinio konstruis sian unuan glacirompan ŝipon, kiu kun alia nova ŝipo fariĝis savŝipoj sur glacia maro. Kiam okazis glaciigo sur la teritoria maro aŭ havenoj de Ĉinio, la ŝipoj tuj veturis tien por savi la sieĝatajn ŝipojn. En la pasintaj 20 jaroj ili 30-foje iris en glaciigintan maron kaj savis dekojn da ĉinaj kaj alilandaj ŝipoj.

Por ekspluati naturan gason en Liaodong-golfo, Ĉinio bezonis surmaran platformon, kiu povas rezisti kontraŭ la premo de glaciigo. Tio postulis ampleksan esploron pri la glaciigo de tiu loko. En la komenco de 1988 glacirompa ŝipo portis ekspertojn de Ĉinio kaj FR Germanio al glaciiginta maro. Ili esploris la maron en 12 tagoj kaj bone finis la esploron de ĝia glaciigo.

Esplorado de glaciigo



Trahaki vojon en glaciiginta maro

# Xin Qiji, Patriota Ci-isto de la Suda Song-dinastio

de MEI ZHI

**X**IN Qiji (Ŝin Ĉjiĝji) kaj la patriota poeto Lu You vivis en la sama periodo. La literatura talento de Xin Qiji montriĝis ĉefe en ci-verkado. Liaj ci-oj emociaj kaj inspiraj prezentis ĝojon kaj malĝojon de la epoko, en kiu li vivis, indignon kaj esperon de la nacio, dank' al kio ci-oj, tiu nova literatura formo, akiris senprecedencan artan forton.

Je 13 jaroj antaŭ la naskiĝo de Xin Qiji (1140-1207), pereis la Norda Song-dinastio (960-1127). La nordo de Ĉinio falis en la manojn de fremda nacio, ankaŭ la hejmloko de Xin Qiji estis okupita de la malamikoj. Jam en sia infanaĝo, Xin Qiji suferis de la nacia malfeliĉo kaj ekhavis fortan deziron repreni la perditan teritorion kaj venĝi la patrolandon. Je la aĝo de 21 jaroj organizis volontulan armeon el 2000 militistoj kaj gvidis ĝin en la kamparana ribelo. Poste la gvidanto de la ribelantoj estis murdita de perfidulo. De tio Xin Qiji ekbolis de indigno kaj gvidis siajn militistojn en sturmo al malamika kazerno kaj kaptis la perfidulon viva. Post tio li forlasis la nordon kaj iris al la Suda Song-imperio, esperante realigi sian idealon en la sudo: repreni la perditan nordon.

Tamen ankaŭ en la sudo li ne estis kontenta. Komence, malgraŭ sia malalta rango, li plurfoje faris peticiojn al la kortego esprimante siajn strategiajn konsilojn pri repreno de la perdita teritorio. Liaj konsiloj ne estis akceptitaj de la kortego, sed lia talento montrita en la peticioj vekis ĝian atenton. Tial la kortego plurfoje sendis lin solvi iujn malfacilajn problemojn. En la tempo, kiam li funkciis kiel ŝtata oficisto, li estis multe admirata kaj estimata de la popoloj pro siaj bonfaroj. Sed liaj politikaj opinioj neniam estis aprobitaj de la kapitulacemaj korteganoj. En 1181 la 42-jara Xin Qiji estis eksigita pro akuzo. De tiam li longatempe vivis ermite, interalie li estis alvokita al ŝtata ofico dufoje, sed eksigita post nelonge.

Xin Qiji vivis en la serioza periodo de la nacia krizo. Repreni la perditan teritorion kaj fari meriton por la patrolando estis lia idealo dum la tuta vivo. Li kun elstara talento, taŭga por esti generalo kaj kortegano, estis neglektita ĉ. 20 jarojn en la Suda Song-dinastio. Tiu travivaĵo faris liajn verkojn bra-

vaj kaj mornaj, grandiozaj kaj tristaj. La forta patriota patoso ĉiam estis la ĉefa penslinio en lia literatura verkado. Li postlasis pli ol 600 ci-ojn, kies triono estis verkita post lia ekŝiĝo. En tiu periodo li vivis aflikte, sed li ĉiam pensis pri la nacia krizo kaj la patria sorto. Liaj ci-oj heredis la grandiozan stilon de la granda literaturisto Su Shi (1037-1101) de la Norda Song-dinastio, plilarĝigis la kampon de ci-oj kaj kondukis ci-ojn al pli vasta kaj pli agita socia realo.

Fronte al la nacia krizo, Xin Qiji ĉiam spiras bravan heroecon por savi la patrolandon:

*Per akvo de l' River' Arĝenta<sup>1</sup>*

*Li lavos spurojn malamikajn.<sup>2</sup>*

(El "Laŭ la melodio Shuidiaogetou")

*"Bravuloj batalas ĝis morto",*

*Provu nian forton*





*Por repreni l' nordon.*

(El "Laŭ la melodio Hexinlang")

*Kolorajn ŝtonojn vi preparos,*

*La ĉielon nordan riparos.<sup>3</sup>*

(El "Laŭ la melodio Manjianghong")

Tiuj versoj estas kaj tristaj kaj bravaj. Kiam la patrolando troviĝis en danĝero, ili elspiras inspiran patoson. La ci-o "Laŭ la melodio Shuilongyin, je la Naskiĝ-tago de Han Nanjian", plene montris liajn naci-savan aspiron, prizorgon kaj kompaton al la popolo vivanta sur la perdita teritorio kaj riproĉis la kapitulacemaj imperiestro kaj korteganoj de la Suda Song-dinastio. La vortoj en la ci-o "forpelos l' invadantojn", "reordigos l' patrolandon" prezentis lian aspiron.

Li ja deziris provi sian forton por la patrolando, sed bedaŭris mankon de ŝanco por montri la talenton, sekve de kio en liaj ci-oj ofte legiĝas profunda bedaŭro pro vaniĝo de la bela idealo. Atinginte la sudon, Xin Qiji plurfoje faris peticiojn al la imperiestro pri la ŝtata afero, sed ili estis neglektitaj. Li indigne verkis la faman ci-on "Laŭ la melodio Shuilongyin, Ascendo de la Kiosko Shangxin de Jiankang":

*Bedaŭras mi la tempforfluan,  
dum triste pluvas, triste ventas.*

*Eĉ olda arbo tion sentas!*

*Ja kiu voki belulinon sendus,*

*ke ŝi forviŝu l' herolarmojn,*

*kiuj el mia kor' torentas!*

En "Laŭ la melodio Shuidiaogetu" li komparis sin kun arko pendanta surmure por verŝi la ĉagrenon pri senfaro:

*Mallongas lampostablo,  
dum longas spadoŝtalo—  
ĝin kovros rustvualo.*

*Pafark' senfare pendas sur la muro,  
kaj speguliĝas en pokalo.*

Li afliktiĝis pro la disreviĝo de sia idealo en la juneco, karesante siajn arkon kaj sagojn kaj dirante:

*Han-Xin-a historio<sup>4</sup>*

*ne eblas ja hodiaŭ.*

*Larmigas la perditaj montoj kaj riveroj  
de l' patrio.*

*dum vane grasas la ĉevaloj niaj,*

*En vespersuno viglas Hu-kavalerio<sup>5</sup>*

(El "Laŭ la melodio Mulanhuaman")

La dissplitiĝo de la patrolando ĉiam kaŭzis korŝiron kaj larmojn al la ci-isto ĉu sobra ĉu ebria:

*Se la amikoj en Chang'an demandas pri mi,  
sciigu ilin, ke mi ĉiam tristas en drink-ago,  
forvidas en aŭtunciel' sovaĝanserojn,  
tiradas arkon en ebri' sen sago.*

(El "Laŭ la melodio Mulanhuaman")

*Mi laŭte kantas en noktmezo kaj hurladas vento,  
batale tintas la pendferoj<sup>6</sup> rande de l' tegmento.*

*La sudo kaj la nordo  
splitiĝis ĉe l' momo ito!*

(El "Laŭ la melodio Hexinlang")

Ankaŭ la ci-o "Laŭ la melodio Pozhenzi" estas unu el la elstaraj verkoj de Xin Qiji:

*Lumigis lampon mi ebrie por rigardi l' spadon,  
kaj sonĝis pri kornsonoj laŭtaj en tendaro.  
Jen okcentliaj<sup>7</sup> soldatvicoj ĝuas bovrostajon,  
kordinstrumentoj ludas jen ariojn de batalo.  
Paradas en aŭtun' la soldataro.*

*Galopas flugrapide ni sur la ĉevaloj,  
bruegas tondromuĝe la pafarkaj knaroj.  
La terperdaĵon repreninte por l' imperiestro,  
mi ĝuus dum kaj post la vivo gloron pro la faroj.  
Bedaŭre jam aperis blankaj haroj!*

La ci-oj plenaj je patriota patoso estis plej brilaj kaj profunde kortuŝaj.

Estis pli grave, ke la sento de Xin Qiji ŝanĝiĝis ne pro lia persona gajno aŭ perdo, sed pro la sorto de la patrio kaj nacio, tio donis al liaj ci-oj pli profundan socian signifon. La ci-oj de ordinara literaturistoj plejparte temis pri amo de gejunuloj, pri ĝojo kaj veo, kuniĝo kaj disiĝo, sed Xin Qiji opiniis:

*Ja estas, laŭ devenoj,*

*mil specoj de ĉagrenoj.*

*Ĉu nur disiĝo de karuloj naskas ĉagrensenton?*

*Ne plej teruras la ondegoj en rivortorento,*

*ja malfacilas pli vojiro en la homa gento.*

(El "Laŭ la melodio Zhegutian")

Kun pli profunda ĉagreno Xin Qiji verkis ci-ojn plenajn de senmorta alloga forto.

En sia 20-jara ermita vivo en kamparo, Xin Qiji verkis nemalmultajn freŝstilajn ci-ojn pri la kampara vivo kaj kampara pejzaĝo. La ci-o "Laŭ la melodio Qingpingyue" estis lia verko pri tiu temo kun originalaj trajtoj:

*Malaltas mia pajlkabano,*

*ĉe l' rojo ĉarme verdas la herbaro.*

*Ebriiĝinte, en sudlanda dialekto,*

*ŝercadas gaje jen blankhara olda paro.*

*L' unua filo sarkas borde en la oriento;  
la dua plektas kokokaĝon je l' momento,  
la plej amata bubo tria borde kuŝas  
kaj lotussemojn frande manĝas en kontento.*

En la ci-o "Laŭ la melodio Xijiangyue, Nokta Vojaĝo sur Vojo de Huangsha", li bildigis belan pejzaĝon de la sudo en somera nokto kaj montris sian gojon pri la baldaŭa riĉrikolto:

*Pri l' hela lun' ekmiras branĉe l' cikonioj,  
en friska vento noktomeze ĉirpas la cikadoj.  
En rizaromo ni babilas pri l' abunda jaro,  
aŭdiĝas ĉie vervoplana rankvakado.*

Ankaŭ liaj lirikaj ci-oj entenis profundan signifon, ekz., la ci-o "Laŭ la melodio Chounuer":

*En juna aĝo mi ĉagrenon ne ankoraŭ sentis,  
kaj etaĝdomon reascendis,  
la etaĝdomon reascendis,*

por versojn verki mi afekte pri tristeco plendis.  
Hodiaŭ mi jam plene spertis tristan sentimenton,  
mi volas plendi sed silentas,  
mi volas plendi sed silentas,  
kaj diras: "Pri l' aŭtuno friska vere

mi kontentas!"

Ĝi ŝajnis simpla, sed la enhavo pripensiga. Lia aflikto pri la patrio kaj popolo iam ne estis plene prezentbla. Lia ci-o "Laŭ la melodio Qingyu'an" priskribis homplenan nokton de la Lanterna Festo (la 15-a de la unua monato laŭ la luna kalendaro de Ĉinio) en urbo, la sceno estis vivovera, precipe tiu priserĉo de amato en homamaso, en ĝia dua parto. Kvankam ĝi ne havis tro multan poluradon, tamen la momenta strebo estis implice kaj vive priskribita. Xin Qiji estis ci-isto, kiu majstris krei grandiozan etoson por

prezenti sian batalan travivaĵon kaj grandan politikan idealon. Ankaŭ liaj ci-oj "Laŭ la melodio Qingpingyue" kaj "Laŭ la melodio Qingyu'an" montris lian implican sentimenton, alian flankon de liaj verkoj. ■

1. T.e. la Lakta Vojo laŭ ĉina mito.
2. La versoj aludas forpeli alinaciajn invadantojn.
3. La versoj aludas repreni la perditan teritorion kaj unuigi la patrion.
4. Han Xin (?-196 a.K.) majstre komandis armeon, komence estis rekomendita al Liu Bang, fondinto de la Okcidenta Han-dinastio (206 a.K.-25 a.K.), sed li ne estis multe atentata. Pro tio li foriris. Informiĝinte, Xiao He, ĉefa konsilisto de Liu Bang, tuj postkuris lin en la nokto kaj revenigis lin. Poste, helpate de Han Xin, Liu Bang venkis la fortan armeon de Xiang Yu kaj fondis la Okcidentan Han-dinastion.
5. Hu-kavalerio — kavalerio de la norda gento hu.
6. Pendfero — tintilo pendanta ĉe ĉinstila tegmentrando kaj tintanta en vento.
7. Lio = 1/2 kilometro.

## EL CI-OJ DE XIN QIJI

### Laŭ la melodio "Pusaman"

(Skribita sur Muro de Zaokou en Jiangxi)

Sub la teraso Yugu fluas en Qingjiang-rivero  
multe da larmoj de l' irantoj pro invadsufero.  
Rigard' al Chang'an en nordokcidento,  
bedaŭr' pro l' multaj montoj en ostento\*.

Malgraŭ la montoj kuras la torento,  
finfine venos ĝi al l' oriento.  
En vesperhelo min ĉagren' doloras,  
profunde de l' montar' kukuo ploras.

### Laŭ la melodio "Qingyu'an"

Vespere de la Dekkvina de la Unua  
Monato\*\*

Mil arbojn disflorigis nokte l' blov' el oriento;  
stelar' de l' firmamento  
defalis en la vento.  
Kaleŝoj luksaj kun stalonoj, ĉie parfum-tento.  
La pajnoŝalmoj verve sonis,

la lun' ascendis kaj descendis,  
tutnokte daŭris fajraj danc-prezento.

Kun harornamaj bantoj, pingloj el oro kaj argento,  
babilis ride belulinoj en la homtorento.  
En homamasoj ŝi lin serĉis longe kun atento.  
Subite ŝi la kapon turnis,  
kaj la amatan viron trovis,  
ĉe loko kun malmultaj artaj lumoj en ostento.

### Laŭ la melodio "Zhegutian"

Junage mi komandis dekmil virojn sub la flagoj,  
kaj rajdis en kirasoj trans riveron por atakoj.  
La nordajn malamikojn vigle gardis en la noktoj,  
ni hanaĵ armeanoj pafis sagojn en la tagoj.

Pasinton mi memoras,  
suspiras pro ĉi jaro.

En vent' printempa ne nigriĝos miaj

blankaj haroj...

Por mia dekmil-vorta noto al lia Majesto,  
ricevis mi priterkulturan libron de l' najbaro.

Trad. LAŬLUM

\* Ostento — paradi, senbezzone montri siajn riĉaĵojn, sciojn k.a.

\*\* La Dekkvina de la Unua Monato (lunkalendaro) estas ĉina tradicia Lanterna Festo kaj tiuvespere oni eksponas diversajn artajn lanternojn kaj ludas per fajraĵoj.

## ĈINMEDICINA PREVENTO KAJ KURACADO DE OFTAJ MALSANOJ (1)

**MALVARMUMO:**

Malvarmumo estas unu el la oftaj malsanoj. La vintra kaj printempa vetero estas ŝanĝigema. Kiam oni estas atakita de malvarmo aŭ pluvo kaj tiukaze havas malfortan reziston kontraŭ malsanoj, oni malvarmumiĝas facile. Ĝenerale la simptomoj estas febro, kapdoloro, naz-ŝtopiĝo, muka elfluo, terno k.a. Laŭ la tradicia ĉina medicino, estas du kategorioj de malvarmumo. Unu estas kaŭzita de vento kaj malvarmo kaj la alia de vento kaj varmo. Nature la kuracaj rimedoj kontraŭ ili estas malsamaj.

La suferanto de la antaŭa sentas grandan malvarmon, malfortan febron, kapdoloron kaj doloreton tra la tuta korpo, ne soifas, elfluigas maldikan mukon kaj havas maldikan tavolon da blanka tegaĵo sur la lango kaj malfortan pulsadon. Tiam oni devas preni drogojn pikajn, varmigajn kaj ŝvitigajn por forigi la venton kaj malvarmon:

A. Prepari dekoktaĵon el 10 g. da perilaj folioj, 3 pecoj da zingibro kaj 10 bulboj de ŝenoprazo, aldoni al ĝi 50 g. da bruna sukero kaj preni ĝin dufoje, dum ĝi estas varma.

B. Por kuraci gravan malvarmumon oni povas preni dufoje dekoktaĵon el la medicinaĵo *Jingfangbaidusan* kun herbo (*Herba Schizonepetae*) kaj radiko de ĉina pastinako kiel la ĉefaj ingrediencoj.

La suferanto de la lasta havas fortan febron, sentas malvarmeton, kapdoloron kaj gorgan doloron, elfluigas densan mukon, soifas kaj havas maldikan tavolon da

flava tegaĵo sur la lango kaj malfortan kaj rapidan pulsadon. Tiam oni devas preni drogojn pikajn, malvarmigajn kaj ŝvitigajn por forigi la venton kaj varmon:

A. Prepari dekoktaĵon el po 10 g. da morusaj folioj, krizantemo, mento, forsitiaj fruktoj kaj bambuaj folioj kaj preni ĝin dufoje, aŭ preni ĝin kune kun unu saketo da pulvoro *Ganmaochongji*, 3-foje ĉiutage.

B. Por kuraci seriozan febron kaj fortan gorgo-doloron, kaŭzitan de malvarmumo, oni povas preni pilolojn *Yinqiaojiedu*, po unu ĉiufoje, 3-4-foje ĉiutage.

C. Kiam la paciento suferas malfortan febron sed fortan tusadon, tiam li povas preni pilolojn *Sangju*, po unu ĉiufoje, 3-4-foje ĉiutage.

Preventado estas ĉefa rimedo kontraŭ malvarmumo. La plej efika rimedo estas fari fizikkulturajn sportadon. Kiam la vetero ŝanĝiĝas, oni devas atenti la vestadon por ŝirmi sin kontraŭ varmo aŭ malvarmo. Trafite de pluvo, oni devas preni zingibran dekoktaĵon kun bruna sukero. Ŝvitinte post fizika laboro aŭ sporta aktivado, oni ne devas tuj demeti siajn vestojn aŭ sin bani en malvarma akvo. Krome, oni devas ankaŭ ofte malfermi fenestron por refreŝigi la aeron en ĉambro.

Por febla kaj ŝvitema homo, kiu ofte suferas malvarmumon, oni povas prepari pulvoron el 120 g. da astragalaj radikoj, 60 g. da rizomo de atraktilodo (*Atractylodes macrocephalae*) kaj 20 g. da ĉina pastinako. La paciento prenu po 5 g. da tia pulvoro miksitita kun

varmeta boligita akvo kun bruna sukero ĉiumatene kaj ĉiuvespere en kelka tempo.

**VOMADO:**

Vomado estas simptomo kaŭzita de multaj malsanoj. Laŭ la tradicia ĉina medicino ĝi estas kaŭzita ĝenerale de hipofunkcio aŭ hiperfunkcio.

Vomadon pro hiperfunkcio estigas manĝaĵo aŭ eksteraj faktoroj. Ekz., vento, malvarmo, somera varmo kaj humideco atakas la stomakon kaj perturbas ĝin, ke la gaso en la stomako ne povas iri malsupren kiel kutime, ankaŭ troa manĝado aŭ manĝaĵo nekuirita, malvarma kaj grasa povas stagni en ĝi kaj kaŭzas malfunkciadon de la gaso aŭ iafoje gaso en la hepato estas malhelpata.

Vomado pro hipofunkcio estas kaŭzita de la perturbo en la lieno kaj stomako.

La kuracistoj de ĉina medicino, ĝenerale, faras diagnozon laŭ jenaj simptomoj:

A. Malvarma vomado okazas ofte pro atako de malvarmo. La vomado estas nedigestita manĝaĵo aŭ nur akvo. La paciento ne soifas, ŝatas varmon, timas malvarmon aŭ sentas neevidentan doloron en la ventro. Por kuraci la vomadon oni povas trinki bone miksititan sukron de zingibro kaj perila folio kune kun varmeta boligita akvo.

B. Varma vomado okazas ofte pro atako de somera varmo. La paciento vomas tuj je vido de manĝaĵo, soifas, ŝatas malvarmon kaj timas varmon. La urino estas malmulta kaj flava. Por kuraci la vom-

(daŭrigo sur p. 17)

# Kiel Mi Studis Eksterlande?


**K**IEL scienc-teknikisto, mi deziris jam delonge lerni kaj labori en lando evoluinta en sciencoj kaj teknikoj por kompletigi miajn sciojn kaj fari pli da kontribuoj al mia patrio. Tamen, post kiam mia deziro realiĝis, mi ekkomprenis, ke tio postulas penigan laboron.

Kiel unu el la unuaj veturantoj al eksterlando de la Ĉina Akademio de Sciencoj, mi atingis Usonon maje de 1978.

En niaj unuaj tagoj en Usono, ni faris kelkajn stultaĵojn. Ni ĉiam piediris tien kaj reen en Vaŝington. Por ŝpari ĉiun moneron ni piediris ofte pli ol unu horon al la ambasadorejo por tagmanĝo. Ni mem lavis vestojn anstataŭ pagi por uzo de lavmaŝino. Nia pensmaniero ŝanĝiĝis nur post longa tempo. Fine ni komprenis, ke niaj tempo, energio kaj sano estas multe pli gravaj ol la ŝparita mono.

Tamen pli grandajn malfacilojn ni renkontis en la laboro. La instrumentoj en la labo plejparte estis ne viditaj por mi kaj sekve mi ne sciis, kiel uzi ilin. Tie estis plena kesto da uzinstrukcioj. Tralegi ilin postulas almenaŭ duonjaron. Mi posedis nur fundamentajn sciojn pri la studa temo kaj ne sisteme lernis kelkajn gravajn fakojn. La koncernaj referencaĵoj estis malfacile komprenataj kaj plie mi ne povis fari profundajn diskutojn kun miaj kolegoj pro la lingva obstaklo.

Tiam, mi eĉ ne komprenis la diskuton en la semajna kunsido kaj mem parolis nenion. La embaraso multe ŝokis min. Sciuj, ke ni estis la unuaj elektitoj por studi eksterlande post ekpraktiko de la pord-



Gastado ĉe kanadaj eruditaj

malferma politiko de Ĉinio. Mi devas konfesi la fakton kaj kompletigi miajn sciojn kiel eble plej rapide por kuratingi la aliajn.

La plej bona rimedo por kuratingi la aliajn estas solvi la ĉefajn problemojn. Unue, pripensi kion mi devas fari, enlistigi la problemojn nekomprenatajn por mi, inkluzive de la funkcioj kaj manipulado de la aparatoj, kaj poste konsulti aliajn, noti iliajn klarigojn kaj min ekzerci kelkfoje. Tiel mi povis trovi la ŝlosilajn punktojn de ĉiuj aparatoj, kaj post tio legi koncernajn partojn de la uzinstrukcioj, kaj post 2-3 monatoj mi jam fariĝis lerta en funkciigo de la tuta kompleksa sistemo kaj rikoltis kontentajn rezultojn.


Sed, estas malfacile kompletigi la fakajn sciojn. La apokalipsaj

dokumentoj estas malfacilaj kaj monotonaĵoj por legado. Iam mi preskaŭ perdis memfidon kaj volis lerni unue fundamentajn studobjektojn kaj poste fari la sciencajn esplorojn. Sed por fini tiun rutinan vojon mi bezonas almenaŭ unu jaron. La fiereco kaj superemeco ne permesis al mi tion fari. Mi rememoris iun antikvan pentriston: Li iris aliloken por apreci alies kaligrafiaĵojn. En la unua fojo, li sentis bedaŭron, opiniante, ke la kaligrafio ne meritas la honoron. Sed volis tuj foriri, ĉar li venis de malproksime. Li do refoje aprecis en la sekvanta tago. Ĉi-foje li ekkonis la veran valoron de la kaligrafiaĵoj. Li do restis tie pli ol 10 tagojn por ilin lerni, apreci kaj primediti foje refoje, ne volante foriri. Ankaŭ mi tiel faris: Mi kopiis la gravajn materialojn, ĉiam ilin portis, foje-refoje studis, legis almenaŭ 10 fo-

jojn. En la legado, mi komprenis pli kaj pli multe, kaj fine trovis la fundamentajn sciojn, kiujn mi vere ne komprenis, kaj turnis min al referencaj materialoj por solvi tiujn problemojn. Tia studo estis vere laciga. Iam min enuigis la vivo — sen plezuro, sen ferioj, kaj la manĝaĵo monotona — stufitaj kokoj kun sojsaŭco... Tamen post kelkaj monatoj, mi povis facile legi referencajn materialojn kaj esprimi miajn opiniojn en kunsidoj. Finfine, mi akiris la plezuron en la esplorado de sciencaj veroj: Mi vidis la kurbajn liniojn montritajn de registriilo, kiujn mi atendis de longe.

Unu jaron poste, oni sendis min al la Masaĉuseca Instituto de Teknologio. Tie mi fariĝis pli lerta en la scienca esplorado. En simpozio mia instruisto min konigis al la ĉeestantoj: "En kelkaj semajnoj, li povas plenumi tion, kion aliaj studentoj devas fari en unu jaro." Liaj vortoj tre ĝojigis min kaj kompensis miajn suferojn en la unuajara vivo eksterlande.

En junio 1981, mi estis invitita kiel prezidanto de iu kunveno de la 36-a Internacia Konferenco pri Molekula Spektroskopio. Tiutage, sur la podio min okupis nur unu penso, ke mi estas ĉino, filo de nia patrio. Se mi ne tiel pensus, mi certe ne povus paroli eĉ unu vorton pro timo antaŭ la amaso da mond-famaj erudiciuloj.



La aŭtoro kaj liaj kolegoj en laboratorio

Mi publikigis pli kaj pli da disertaĵoj, kiuj ĉiuj min ĝojigis. Poste mi tamen trovis, ke neniu el ili indas la fieron, ĉar ili ĉiuj estis verkitaj en kunlaboro kun aliaj eksterlande. Ankaŭ aliaj povas tion fari en la samaj cirkonstancoj. Mi faris nur iom pli rapide. Mi opinias, ke estas valora nur tio, kion faris mi mem kun klaraj personaj trajtoj. Mi esperas, ke mi faros altnivelajn laborojn por montri la talenton de ĉinoj.

Kun tiu volo, mi revenis en 1982 al Qinghai, Ĉinio, kaj translokiĝis en Dalin en 1984. Dank' al la penado de mi kaj miaj kolegoj progresis la sciencaj laboroj en la

du lokoj.

Antaŭ nelonge mi eklaboris en la Universitato de Cambridge, Britio, kiel gasto-esploristo de la Reĝa Kolegio de Britio. En la semajnofino, mi ofte iris al la granda katedralo en la Instituto de Trilinity, tie staras statuo de Neŭtono, kiu ĉiam rigardas la ĉielon per siaj brilaj okuloj. Starante antaŭ ĝi, mi ofte rememoras miajn idealojn en la knabeco kaj la ŝanĝiĝojn en la vivo. ■

\* La aŭtoro, profesoro-esploristo de la Dalian-a Bioĥemia Instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj, naskiĝis en 1946. Nun li laboras kiel gasto-esploristo en la Universitato de Cambridge, Britio.

## DONACA KARTO

La donacan karton vi povas uzi kiel pagilon kun la suba indikita valoro por mendi librojn, kasedojn, k.s. nur en la librovendejo de Eldonejo kaj Librejo Sonorilo.  
Doornstraat 22, 2610 Wilrijk, Belgio

**VALORO: 200 BF**

Ekde la aĉeto de 2000 BF!

Validas ekde 01.04.1989 ĝis 01.06.1989

(La supra Eldonejo-librejo estas peranto de ĉinaj E-eldonaĵoj en Belgio)

# Yangzhou kaj Zhenjiang abundaj je fiŝoj kaj rizo

**Ĉ**E la kunfluejo de la malsupra baseno de Yangzi-rivero kaj la Granda Kanalo troviĝas pluraj urboj mezgrandaj kaj malgrandaj kun originala trajto: Zhenjiang, Yangzhou, Changzhou k.a. Interalie la elektronika industrio de Changzhou disvolviĝas kompare rapide, pri tio nia revuo raportis

plurfoje. Ĉi-foje mi vizitis Yangzhou kaj Zhenjiang.

## YANGZHOU KUN ORIGINALA ĈARMO

Oni diras, ke Yangzhou estas turisma urbo kun originala ĉarmo,

kion mia vizito konstatis.

Yangzhou situas en la meza parto de Jiangsu-provinco, sude de ĝi fluas Yangzi-rivero kaj norde Huaihe-rivero, la Pekin-Hangzhou-a Granda Kanalo trafluas la urbon, ĝia trafiko estas tre facile. Ĝi konstruiĝis en la lasta

Shouxihu-lago en Yangzhou

Foto de LI ZHENTING




de **ZHANG QINGZHEN**


Fotoj de **LI CHUNGENG**

periodo de Printempo kaj Aŭtuno antaŭ 2400 jaroj. Kaj nun la urbo Yangzhou baniĝas en bela printempo, plena de vignejo.

Mia hotelo troviĝis ĝuste apud Shouxihu-lago okcidente de la urbo. Vespere mi ofte promenis ĉe la laga bordo por ĝui ĝian belan




Heyuan-ĝardeno en Yangzhou



Polurado de jadaĵo

Foto de **ZHANG JINGDE**





tradiciaj ĉinaj metiartaĵoj kun trajto plastike simpla kaj antikva, gravure delikata, desegne bela kaj helkolora. La lakaĵoj inkludas produktaĵojn gravuritajn, kun inkrustaĵoj jadaj, perlamotaj, ostaj, ŝtonaj k.a. La specoj de lakaĵoj estas ekrano, ŝrankoj por televidilo, biero kaj diversformaj vazoj, pladoj, pelvoj kaj skatoloj. La tradiciaj jadaĵoj de Yangzhou estas forneto, lumturo, floro kaj birdo, besto, belulino, budha statuoj k.a. La praktike uzeblaj jadaĵoj estas bovlo, kruĉo, taso, ornamaĵo, rozario k.a. La lakaĵo kaj jadaĵo de Yangzhou atingis sufiĉe altan nivelon en Han-dinastio. Tial Yangzhou estas ankaŭ unu el la gravaj originoj de ĉina lakaĵo.

pejzaĝon. Shouxihu-lago famiĝas pro sia beleco. Ĝi havas kvietan medion, klaran akvon, la pavilonoj kaj kioskoj dislokiĝas sur la bordo. En la laga mezo staras monteto, ĝi aspektas bela pro la ĉirkaŭa akvo. Sur la 8-kilometra bordo de Shouxihu-lago oni konstruis pli ol cent ĝardenojn. Yangzhou famiĝas ankaŭ pro siaj multaj ĝardenoj. Nun la famaj ĝardenoj Geyuan kaj Heyuan estas protektataj de la ŝtato kiel historiaj objektoj. La ĝardenoj de Yangzhou havas originalan stilon kun trajto de gran-

diozeco kaj delikateco. Lastatempe, Shouxihu-lago estis difinita de la ŝtato kiel ĉefa vidindejo de la tuta lando.

La metiartaĵoj de Yangzhou havas vastan famon. Yangzhou produktas 83-specajn metiartaĵojn de lakaĵoj, jadaĵoj, brodaĵoj, bambuaj, pajlaj kaj salikvergaj plektaĵoj, flor-pentraĵoj, tapiŝoj, fajraĵoj, petardoj, ludiloj k.a. Iliaj evidenta nacia stilo kaj forta loka koloro estas multe ŝatataj de la klientoj.

La lakaĵo de Yangzhou havas longan historion kaj estas unu el la

En la historio Yangzhou estis fama flora urbo. Kiam mi vizitis Yangzhou, tie ĝuste okazis Festivalo de Viburno (*Viburnum macrocephalum*). Viburno estas fama floro kreskanta sole en Yangzhou kaj ankaŭ la urba floro de Yangzhou. La alia elstara tradicia arto de Yangzhou, envaza miniatura pejzaĝo, prosperis en la dinastioj Ming (1368-1644) kaj Qing (1644-1911) kaj estis unu el la kvin skoloj de ĉina envaza miniatura pejzaĝo el arboradika ŝtupo. La envaza miniatura pejzaĝo de Yangzhou imitas la ĉinan pikturon, aranĝiĝas nature kaj prezentas senliman spacon per malmulta pejzaĝo. Vastospace impresas la mont-akva kaj akva-ŝtona envazaj miniaturaj pejzaĝoj.

Strato Sanyuan en Yangzhou



## LA DISVOLVIĜANTA EKONOMIO DE YANGZHOU

En la lastaj jaroj disvolviĝis rapide la ekonomio de Yangzhou. En 1985 la industria produktovaloro de Yangzhou jam superis 10 miliardojn da juanoj. Ĝia industrio formis sisteman strukturon de mekanika, tekstila, malpeza, manĝaĵa, kemia kaj elektronika industrioj kun lokaj trajtoj. 300 specoj de ĝiaj produktaĵoj akiris oran medalon internacie, oran aŭ argentan medalon de la ŝtato, bonkvalitan premion de Jiango-provinco.



La loko havas mildan klimaton, abundan pluvon kaj fekundan teron. Ĝia norda parto abundas je greno, kotono, manĝebla oleo, akvoproduktaĵoj, brutoj kaj kortobirdoj, tial la loko ricevis belan nomon "lando abunda je fiŝoj kaj rizo". En la okcidenta parto prosperas floroj, fruktarboj kaj la loko famiĝas pro arboj, fruktoj kaj teo. La sudorienta parto abunde produktas ginko-fruktojn kaj porkojn. En Yangzhou subtere rezerviĝas ŝtona oleo, karbo, karbona dioksido, kvarco kaj minerala akvo kun bona ekspluata perspektivo.

En la urbo mi vizitis la Jiangdu-an Akvomastroman Centralon, 14 km. oriente de la urbo. Ĝi havas 4 grandajn elektrajn pumpstaciojn ekipitajn per 33 maŝinoj kun totala kapacito de 49800 kW kaj la projektita flukvanto de 473 m<sup>3</sup> po sekundo. Ili kun la finkonstruitaj 12 akvokluzoj, 5 ŝipokluzoj, 2 kulvertoj, 2 fiŝvojoj kaj drena kanalo konsistigas la Jiangdu-an Akvomastroman Centralon. Ĝi estas sinteza konstruo de irigacio, drenado, navigado kaj elektro-produktado.

## LA ORA MONTO DE ZHENJIANG


Forlasinte Yangzhou kaj transveturinte Yangzi-riveron per pramo, post unu horo mi atingis la urbon Zhenjiang ĉe la suda bordo.

Zhenjiang, fama kultura urbo kun historio de 3000 jaroj, situas ĉe la kunfluejo de Yangzi-rivero kaj Pekin-Hangzhou-a Granda Kanalo kaj estas unu el la ĉefaj turismaj urboj de Ĉinio.

Atinginte Zhenjiang, kun granda intereso mi vizitis la Oran Monton.

Antaŭe la monto troviĝis en la mezo de Yangzi. Poste la rivero iom post iom moviĝis norden, la monto kunligiĝas kun la bordo. Ĝi estas unu el la famaj sanktaj budhismaj lokoj de Ĉinio kaj havas multajn antikvajn vidindejojn.

La templo ĉe la Ora Monto havas historion de 1600 jaroj. Kun la



Pagodo Wenfeng apud la Granda Kanalo en Yangzhou

paso de tempo la templo alinomiĝis plurfoje. Ĝis Qing-dinastio, kiam la imperiestro Kangxi (1662-1723 sur la trono) kune kun sia patrino vizitis la monton, la templo estis nomita Jiangtian-a Budhista Templo. Sed oni kutime nomas ĝin Templo de Ora Monto.

En la templo la altanoj kaj pavilonoj kunligiĝas unu kun alia kaj zigzagas longa koridoro. La malproksimaj pejzaĝoj de tie vidataj estas majestaj, proksime la medio kvieta kaj antikvaj arboj skrapas preskaŭ la ĉielon. Oni laŭdas la templon plej bela vidindejo sude de Yangzi-rivero.

La sep-etaĝa Cishou-pagodo de la Ora Monto kaj la Plurpejzaĝa Turo de Beigu-monto, unu el la tri grandaj famaj turoj ĉe Yangzi-rivero, reliefigas unu la alian kaj estas la plej taŭgaj lokoj por ĝui la pejzaĝon de Yangzi-rivero. Legendo diras, ke la fama bonzo Fahai akiris oron, fosante teron en la Templo de Ora Monto, tial la loko ricevis la nomon Ora Monto. Ĝi estas ne granda, sed impresas grandioze, la pagodo estas ne alta,

sed ŝajnas ĉielskrapanta.

## BONODORA VINAGRO DE ZHENJIANG

Menciante Zhenjiang, ĉinoj ekpensas ĝian bonodoran vinagron. La vinagro de longe ĝuas famon kaj estas tradicia loka produktaĵo. Ĝin oni komencis produkti en 1840. En la komenco de la kuranta j.c., ĝi jam akiris oran medalon en ekspozicio de alia lando. En 1985 ĝi akiris oran medalon de la ŝtato kaj oran medalon de la internacia gastronomio.

En la sekvanta tago, post kiam mi atingis Zhenjiang, mi vizitis la Hengshun-an Vinagro-Fabrikon kun longa historio. Ĝia vinagro estas preparita el bonkvalita glueca rizo. Ju pli longe ĝi konserviĝas, des pli ĝi bonodoras.

La vinagro de Zhenjiang povas akceli malkomponadon de kalcio en la manĝaĵo kaj forigi fiŝodoron. Ofte manĝi la bonodoran vinagron povas akceli digeston kaj preventi malvarmumon, disenterion kaj ti-




Haveno Zhenjiang ĉe Yangzi-rivero

Foto de YAN JIN

foidan febron.

Sur la 15-kilometra bordo norde de Zhenjiang staras grandaj modernaj konstruaĵoj. La altaj fabriksdomoj viciĝas de la nordo al la sudo. Sur la bordo vico da grandaj grupoj malsarĝas ŝipojn kun karbo, la transporta bendo ĝin portas rekte al elektrejo, la produktita forta elektrofluo estas senĉese sendata al la elektra reto de orienta Ĉinio. Ĝi estas la plej granda termoelektra centralo en Ĉinio — termoelektrejo de Jianbi.

Zhenjiang estas ankaŭ unu el la plej fruaj komerchavenoj de Ĉinio. La 3 malnovaj kajoj kaj la nova zono de Zhenjiang-haveno formas ventumilforman havenzonon. Ĝi estas la trafika centro de la malsupra baseno de Yangzi-rivero kaj la Granda Kanalo. ■



La Templo de Ora Monto en Zhenjiang

Foto de YUAN ZENGTING



Drakorajdo (Silka pentraĵo en tombo de Chu-regno en la periodo de Militantaj Regnoj)

Diino de Luo-rivero (Pentraĵo de Gu Kaizhi (346-407) de la Orienta Jin-dinastio)

# Ĉinaj Figuro-pentraĵoj (I)

de WANG XIUQIN

ĈINAJ figuro-pentraĵoj estas speco de la ĉina pikturo. Ili aperis pli frue ol la ĉinaj pentraĵoj pri pejzaĝoj, floroj kaj birdoj. Ili temas ĝenerale pri taoismaj kaj



budhismaj aferoj, pri belulinoj kaj aliaj personoj, pri ĝenroj, historiaj rakontoj, ktp. Ilia pentrarto estas delikatlinia kaj liberstila. La delikatlinia estas subtila, dum la liberstila estas simpla, ĉefe por montri la spiriton kaj mienon de homoj.

En la ĉina figuropentrado oni kreas figurojn ĉefe per linioj kaj turnas grandan atenton sur prezentadon de figuroj plastikaj kun vigla mieno kaj prezentas la homajn karakterojn en medio, etoso, homa aspekto kaj moviĝo. La silka pentraĵo "Drakorajdo", elterigita el tombo de Chu-regno de la periodo de Militantaj Regnoj (475-221 a.K.) estas unu el la plej fruaj figuropentraĵoj de Ĉinio. Ĝi aludas la ĉieliron kaj metempsikozon de mortinto. La ĉefa figuro sur la pentraĵo estas vivoplena profilo de la tombomastro. Konturita per nigraj linioj kaj kolorigita forte kaj troige, ĝi tre vivece konigas la rakonton, dum la aliaj objektoj estas blanke desegnitaj simple kaj flue.

En Han-dinastio (206 a.K. — 220 p.K.) disvolviĝis la linia konturado de la ĉina figuropentrarto. Pentristoj prezentis la trajtojn de la figuroj per dikaj kaj maldikaj linioj miksitaj kaj formis malsamajn stilojn. Samtempe ili aplikis troigon, frotadon kaj aliajn pentrartojn kaj per tio metis bazon por la posta delikatlinia kaj forttona figuropentrado de Ĉinio. La silka pentraĵo de la Okcidenta Han-

dinastio (206 a.K. — 25 p.K.) elterigita en Hunan-provinco en la 70-aj jaroj estas konturita per delikataj nigraj linioj kaj brilaj densaj koloroj.

En la dinastioj Wei, Jin (Ĝin) kaj Sudaj kaj Nordaj Dinastioj (220-589) furoris pentraĵoj pri budhistaj figuroj kaj portretoj. Tiam la figuropentristoj surbaze de la tradicia ĉina pikturo asimilis fremdlandajn pikturojn, kunfandis la ĉinan kaj aŭlandajn pentrartojn kaj kreis novan stilon anstataŭigi tuĉadon kaj liniadon per kolorigado. Tiam iuj profesiaj pentristoj, kia Cao Buxing (Cao Buŝing), plej frue ellernis la pikturon de la okcidentaj budhismaj pentraĵoj kaj povis pentri grandajn homfigurojn sur silkaĵo 50 futojn longa. Sur liaj pentraĵoj la proporcio de la homaj kapo, korpo kaj kvar membroj estas ĝusta, linioj krudaj kaj etoso forta. Li donis grandan atenton al la moviĝo, pozoj kaj spiritoj de homfiguroj, neglektante la bagatelojn.

Gu Kaizhi (Gu Kajĝi), eminenta figuropentristo de la Orienta Jin-dinastio (317 — 420), elmetis la tezon "prezenti spiriton per mieno", kiu multe influis la disvolviĝon de la tradiciaj pentraĵoj de Ĉinio. Nun vidiĝas kopioj de liaj ĉefverkoj "Virinaj heroeco kaj virto" kaj "Diino de Luo-rivero". La unua kun subtilaj strekoj brikrugaĵ kaj okretaj similaj al tiuj de Han-

dinastio precize prezentas la statuson kaj karakterizaĵojn de nobelaj virinoj. La lasta temas pri "Diino de Luo-rivero", fama literatura verko de poeto Cao Zhi (Cao Ĝi) (192-232). Literatura historio rakontas, ke virino Zhen (Ĝen), ŝatata de Cao Zhi, estis edzinigita al lia pliaga frato Cao Pi. Ŝi mortis nelonge post sia edziniĝo. Cao Zhi verkis "Diino de Luo-rivero" por montri sian amon kaj sopiron al Zhen. La pentraĵo konigas, kiel Cao Zhi renkontiĝis kun diino Luo ĉe la rivero Luo. Sur la pentraĵo la diino hezitema, tenera kaj korinklina al Cao estas tre simpatia. La pentraĵo portas ĉefe malakitan, bluan kaj cinabran kolorojn. Ĝiaj strekoj estas striktaj kaj delikataj, kiel raŭpoj sekrecias silkon. Ĝi estas tipa delikatlinia figuropentraĵo. La figuroj pentritaj de Lu Tanwei de la Sudaj Dinastioj (420-479) estis elegantaj kun linioj fortaj kaj kontinuaj. Oni nomis liajn pentraĵojn unuspiraj. La verkoj de Zhang Sengyao (Ĝang Sengjaŭ), alia pentristo samtempa kiel Lu, karakteriĝas aliguste. Zhang donis grandan atenton al kolorigo kaj reliefigo. Sur liaj pentraĵoj la figuroj ne estas marasmaj, sed grasetaj.

La ĉina figuropentrado maturiĝis en Tang-dinastio (618-907). Tiam la pentrarto atingis altan nivelon. La pentraĵoj pri belulinoj okupis gravan lokon en la tradiciaj figuropentraĵoj de Ĉinio. Ili asimil-

Ekskurso de Damo de Guo-regno (kopio de Song-dinastio laŭ la originalo de Zhang Xuan de Tang-dinastio)






Imperiestro (Pentrajo de Yan Liben (?-673) de Tang-dinastio)

is utilajn elementojn el la antaŭaj pentraĵoj kaj influis la postajn pentristojn. La linioj de la figuro-pentraĵoj de Tang-dinastio estis pli rafinitaj, variaj en dikeco kaj harmoniaj en tono. En tiu periodo aperis famaj figuro-pentristoj Yan Liben, Wu Daozi, Zhang Xuan (Ĝang Ŝĵuan), Zhou Fang (Ĝou Fang), Han Huang k.a., kiuj postlasis multajn valorajn pentraĵojn. "Imperiestroj de Diversaj Dinastioj" pentrita de Yan Liben, kun fortaj strekoj, versimile prezentas figurojn de 13 imperiestroj. La pentristo prezentis la karakterojn de la imperiestroj per iliaj vestoj, objektoj kaj diversaj pozoj, kaj plie li donis grandan atenton al iliaj vizaĝaj trajtoj por montri iliajn talenton, kvaliton kaj karieron, tiel ke li konigis la socian vivon en pli granda sfero. La pentraĵo "Respektoplene Vizitigi Junan Ŝakjamunion al la Ĉiela Dio" estis farita de Wu Daozi per simplaj, fortaj kaj flekseblaj linioj. "Prilaboro de Silkaĵoj" kaj "Ekskurso de Damo de Guo-regno" estis pentritaj de Zhang Xuan per fortaj strekoj kaj densaj koloroj. Sur ili la homoj estas ĉarme grasetaj. "Sengenaj Belulinoj en Ripozo" estis pentrita de Zhou Fang per subtilaj ruĝaj linioj, ie kun purpura kaj ie kun cinabra koloroj. Sur la pentraĵo difane videblas la brakoj de la belulinoj vestitaj per maldika gazo. "Intelektuloj sub Pino" estis pentrita de Han Huang per elegantaj linioj kun forteco kaj zigzagoj. Sur la pentraĵo la vestoj kun faldoj aspekte mildaj, sed fakte firmaj, elspiras fortan vivetoson.

En la Kvin Dinastioj (907-960) aperis la fama pentraĵo "Han Ŝizaj (902-970) en Nokta Festeno" (Vidu EPC, n-ro 5, 1987, p.34) farita de Gu Hongzhong (Gu Honggong). Ĝi estas eminenta tipo de la ĉinaj delikatliniaj pentraĵoj dense kolorigitaj. La pentristoj pentris virinojn per mildaj kaj delikataj linioj kaj faris klaran kontraston de helo kaj malhelo, ekz. li pentris robojn, litojn kaj tablojn de viroj per malhelaj koloroj kaj virinojn per helaj koloroj, tiamaniere li faris la melankolian heroon Han Xizai (Han Ŝizaj) pli elstara. ■



Fu Xi kaj Nüwa (prapatroj de la homoj laŭ mito de Ĉinio)  
(Pentraĵo de la Okcidenta Wei-regno)



Senĝenaj Virinoj en Ripozo (Pentraĵo de Zhou Fang de Tang-dinastio)

Intelektuloj sub Pino (Pentraĵo de Han Huang (723-787) de Tang-dinastio)



# Orkideoj



Orkideo estas ĝenerala nomo de orkidacoj. En la mondo kreskas 17 000 specoj da orkideoj epifitaj kaj surtere kreskantaj. La surtere kreskantaj cimbidoj "Heroldo de printempo" (*Cymbidium eburneum*) kaj "Tigra kapo" (*Cymbidium hookerianum*) estas tradicie kulturataj en Ĉinio, tial tiuj specoj estas nomataj "ĉinaj orkideoj".

La epifitaj vando-orkideo (Vanda) kaj dendrobio (*Dendrobium*) havas plej multe da varioj. Orkideoj verdas dum la tuta jaro, kun floroj tre graĉiaj kaj aromaj. La poŝtmarko-serio el 4 pecoj kaj unu miniatura peco estis emisiitaj la 25-an de decembro 1988.

